


ISSN 0023-3692

NUMERO 211 (2006:1)

KIE MITOJ KAJ REALECO INTERPLEKTIĜAS





Saluton! Kaj bonvenon al la unua numero de *KONTAKTO* 2006! Jen bona novaĵo por *KONTAKTO*-abonantoj, membroj kaj patronoj de TEJO: ekde nun vi povas legi *KONTAKTON* antaŭ ol ĝi venos al vi en la presita formo, pere de la reta Jarlibro de UEA (www.uea.org). Tio multe utilos, aparte al niaj samideanoj el Amerikoj, al kiuj *KONTAKTO* venas kutime du monatojn post la pre-

numero de la jaro, atendas vin la facila (kaj facilega) vortolisto (p. 16). Simple por rememorigi: tio estas limigita kvanto de facilaj radikoj, kiujn ni uzas por la "facilaj" kaj "facilegaj" artikoloj – ja parto de artikoloj en *KONTAKTO* estas preparita en facila lingvaĵo, por niaj karaj komencantoj kaj iliaj instruistoj.

Ni kore dankas ĉiujn, kiuj kontribuis al *KONTAKTO* en la pasinta jaro, kaj alvokas ĉiujn legantojn ankaŭ verki por *KONTAKTO* – ja viaj kontribuoj, sugestoj, proponoj kaj kritikoj estas pli ol necesaj, *atendataj kaj bonvenegaj!*

Agrablan legadon, kaj ne forgesu rekotizi en TEJO/UEA por 2006, se vi ankoraŭ tion ne faris!

Jenja

sado, pro la malrapida surfaca poŝto.

Alia novaĵo: finfine estas preparata retpaĝo de *KONTAKTO!* Chuck SMITH, la estrarano pri informado kaj tre sperta programisto kaj komputilisto, helpas krei belan kaj modernan retpaĝon, kun ĉiuj novaĵoj kaj certe arkivo de malnovaj numeroj (dankon al vi, Chuck!). Kaj tio signifas, ke baldaŭ *KONTAKTO*-abonantoj havos aliron al ĉiuj lastatempaj numeroj de *KONTAKTO* rete! Ni informos vin pri la novaĵoj ĉi-rilate per la retaj informiloj.

La temo de tiu ĉi numero estas "Kie la mitoj kaj realeco interplektiĝas". Malfermas la numeron artikolo pri la misterskoloj de la antikva mondo (p. 3-4), kaj daŭrigas la temon artikolo pri la reĝino de Ŝebao (p. 7), fare de Olivier GAUDEFRY, kiu multe scias pri la elstaraj virinoj de antikveco.

Multegaj esperantistoj aŭdis pri la bieno-lernejo *Bona Espero*, Brazilo, kaj iuj eĉ havis la ŝancon volontuli tie. Ĝi estas bonega kaj vigla iniciato de brazilaj esperantistoj, kiun nun subtenas bonvolaj esperantistoj el la tuta mondo. Konatiĝu kun ĝi pli profunde (p. 5)!

Nika TURBINA estis nekredible talenta, kaj same nekredible soleca "poetino de la nokto". Legu artikolon pri la enigmo de ŝia talento kaj vivo sur p. 6.

Ĉu vi iam renkontis homon el la jaro 1861? Ne? Tiam legu la intervjuon kun frato D., kiu speciale venis "el la pasinteco" por viziti la kongreson de la Esperanto-ligo por Norda Ameriko kaj rakonti pri sia interesa kaj malfacila vivo (p. 8-9).

Atendas vin ankaŭ du interkulturaj artikoloj: pri adaptiĝo al la vivo en alia lando (p. 10-11) kaj pri stereotipoj (p. 12), recenzo kaj la tuta aro de artikoloj en la rubriko "Opinie" (p. 12-14) – la ĉefa temo de la diskuto estas esprimlibero. Krome, kiel ĉiam en la unua

<ENHAVO>

Misterskoloj de la antikva mondo (Jenja AMIS, Ukrainio/Usono)	3-4
"Ĝi estas ne "projekto", nek "fantazio" – sed konkrete funkcia ekzemplo, ke alia mondo eblas!" (<i>Bona Espero</i>)	5
La soleca poetino de la nokto (Vladimir MASALKIN, Rusio)	6
La reĝino de Ŝebao: inter historio kaj legendo (Olivier GAUDEFRY, Francio)	7
Kubo: belega insularo en la Kariba Maro (Ariadna GARCIA GUTIÉRREZ, Kubo)	7
Gasto el la jaro... 1861 (intervjuo kun frato D.)	8-9
Kiel vi fartas en alia lando?	10-11
Recenze: Arne, la ĉefido	11
Rompante stereotipojn (Jenja AMIS, Ukrainio/Usono)	12
Opinie: Ĉu ni devas ŝanĝiĝi? (Simayre NNEER, Hispanio)	12
Opinie: "Liberecojn oni ja devas limigi" (Hektor ALOS I FONT, Katalunio)	13
Opinie: "La defendado de esprimlibero ne signifas rezignadon de la persona libero" (Arturo Jimenez CARRETERO, Hispanio)	14
Opinie: "Kiu decidus, kio estas ofenda kaj kio ne?.." (Jenja AMIS)	14
Bumerange: Denaskismo – pli atentenda (Anatolo GONĈAROV, Rusio)	15
Proponu viajn temojn! (Anatolo GONĈAROV, Rusio)	15
Informe	15
Facila vortolisto	16

Temoj de *KONTAKTO* en 2006

2006:2. VEGETARISMO/BESTAJ RAJTOJ.

2006:3. LINGVOJ. Limdato: 1-a de majo.

2006.4. EGALAJ RAJTOJ/FEMINISMO, en kunlaboro kun la kampanjo ĈIUJ MALSAMAJ, ĈIUJ EGALAJ <<http://alldifferent-allequal.info/>> de Konsilio de Eŭropo. Limdato: 1-a de junio.

2006.5. TUTMONDIĜO. Limdato: 1-a de aŭgusto.

2006.6. AMO. Limdato: 1-a de oktobro.

Ĉiuj viaj artikoloj, ideoj, konsiloj, rimarkoj estas pli ol bonvenegaj kaj tre bezonataj! Kontakti la redakcion laŭ la nova adreso: *KONTAKTO*, 16800 Phillips Rd. Alpharetta, GA 30004 Usono; ret-adreso: <kontakt@tejo.org>. Se vi sendis ion al la malnova adreso, ne timu, via letero ĉiukaze atingos la redakcion, simple kun ioma malfruo.

Kiel sendi kontribuojn al *KONTAKTO*?

- ✓ sendu prefere tekston originale verkitan en Esperanto aŭ foton/bildon memfaritan
- ✓ se vi sendas tradukon, bv. indiki la originajn fontojn, lingvon kaj aŭtoron. Ĉe fabelo indiku, ĉu ĝi estas popola (kaj de kiu popolo) aŭ verkita de vi
- ✓ *KONTAKTO* ne estas movada revuo, do *ne sendu al ĝi primovadajn raportojn!*
- ✓ indiku, ĉu via artikolo jam aperis, aŭ estas proponata al alia revuo
- ✓ fotoj devas esti bonkvalitaj, ne gravas ĉu nigrablankaj, ĉu koloraj. Ne forgesu aldoni la nomon de la artisto aŭ de la fotinto!
- ✓ dikajn kovertojn prefere sendu registritaj.
- ✓ rete bv. sendi vian artikolon kiel kutiman retmesaĝon aŭ RTF (bv. uzi x-kodon por supersignaj literoj); bildojn – kiel JPEG (150-300 dpi)
- ✓ ilustraĵoj kaj adresoj en la interreto, kiuj rilatas al via temo, estas tre bonvenaj! **Koran antaŭdankon!**

KONTAKTO: Dumonata socikultura revuo de **Tutmonda Esperantista Junulara Organizo** (TEJO), eldonata de **Universala Esperanto-Asocio** (UEA). **Fondita** en 1963. **N-ro 211** (2006:1), 43-a jarkolekto. **ISSN** 0023-3692. **Legata** en ĉ. 90 landoj. **TTT-paĝo:** <<http://www.tejo.org/eldonoj.jsp>>. **Eldonanto** (administrado, abonoj, anoncoj): **UEA:** ☐ Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; tel.: +31 10 436 10 44, fakso: +31 10 436 17 51; ret-adreso: <uea@inter.nl.net>. **Redakcio:** *KONTAKTO*, 16800 Phillips Rd. Alpharetta, GA 30004 Usono; ret-adreso: <kontakt@tejo.org>. **Redaktoro, grafikisto:** Eugenia AMIS (Ukrainio/Usono). **Vic-redaktoro:** Joel AMIS (Usono). **Cef-korektisto:** Paŭlo MOJAJEV (Ukrainio). **Presado:** SKONPRES, Bydgoszcz (Pollando), ret-adreso: <skonpres@poczta.onet.pl>. **Konstantaj kunlaborantoj:** Joel AMIS (Usono), Tatjana AUDERSKAJA (Ukrainio), Giancarlo BARALDI (Italio), Morteza MIRBAGHIAN (Irano), Paŭlo MOJAJEV (Ukrainio), SALIKO, (Finnlando), Behrouz SOROUSHIAN (Irano/Francio). **Facilingvaj artikoloj** estas verkitaj en la niveloj tre *facila* kaj *facila*, laŭ la vortolisto de *KONTAKTO*. Tiu listo aperas kun la unua numero ĉiujare. **Anonctarifoj:** Tutpaĝa 350 EUR, 1/2-paĝa 190 EUR, 1/4-paĝa 100 EUR, 1/8-paĝa 55 EUR, 1/16-paĝa 30 EUR. Anoncoj sur kovrilpaĝoj kostas duoble. Por E-organizaĵoj 50% da rabato. Variantoj de ekstermovadaj anoncoj ricevas maklerajlon de 30%. Por anoncoj bv. kontakti UEA. **Anoncetoj:** por *Anonctabulo* kostas tri internaciajn respondkupononj por dek vortoj. Bv. sendi rekte al la redakcio aŭ al UEA. **Abontarifoj:** varias laŭlande. Petu informojn de UEA. **Malfortvidantoj:** povas ricevi voĉlegitan eldonon senpage. Sendu du 60-minutajn kasedojn al Elise LAUWEN, Fort Alexanderstraat 16, NL-5241 XG Rosmalen, Nederlando. **KONTAKTO en radioj:** Regiono / tempo (UTC) / metroj / frekvencoj (kHz): *Radio Havano (Kubo)* Okcidenta kaj Norda Ameriko kaj Pacifika Azio/ 7:00/31/9 820; Tuta Ameriko kaj Karibio / 15:00, 23:30/25/11 760; Eŭropo Mediteranea/ 19:30, 22:00/21/13 715; <<http://216.138.240.229/rc4>> (je la 15a horo UTC), <http://roi.orf.at/esperanto/es_demand.html> (laŭ mendo tra la servilo de Austria Radio Internacia). *Pola Radio:* elsendoj:13:30/41,23/7 275; ripetoj: 18:00/42.07/7 130; 20:00 kaj 9:30 sekvan tagon (nur per satelito). La satelita ricevo eblas per: Eutelsat II F – 6 – Hot Bird – 13 gradoj de la orienta latitudo; frekvenco 11,474 GHz, polarizado horizontala (H); subportanto 7,38 MHz. <<http://www.wrn.org/ondemand/poland.html>>, <http://www.radio.com.pl/polina/esperanto_eo.asp>, <<http://start.at/retradio>>

La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.

MISTERSKOLOJ DE LA ANTIKVA MONDO

Jenja AMIS, Ukrainio/Usono

Foje mi kun geamikoj, ekskursante tra la antikvaj partoj de Kievo, vizitis malnovegan subteran monaĥejon. Post la promeno ni volis aĉeti kandelojn de la monaĥo, kiu deĵoris ĉe la pordoj. Mi trankvile staris en la vico, sed subite mi aŭdis preskaŭ krion: “Ĉu vi estas jud-framasono?!” Mi ne tuj komprenis, ke tiuj vortoj estas celataj al mi. “Jes, vi!” – la mezmaljuna ortodoksula monaĥo en nigraj, ne tre puraj vestaĵoj, kaj kun longa bruna barbo fingromontris al mi. Kaj mi daŭre ne komprenis la kialon de tiu ĉi eksplodo. “La kruco! Vi havas diablan krucon!” Aĥ, jes, la kruco – mi portis etan arĝentan maltan krucon. “Jes, kompreneble! Tipa ina jud-framasono...” – mi ironiis. Li rifuzis vendi al mi la kandelojn...

Kvankam tiu ĉi historio ne multe rilatas al la temo de tiu ĉi artikolo, ĝi bone reprezentas oftan sintenon, aparte de la konservativaj kristanaj ekleziuloj, al io mistera, mistika kaj esotera – unuvorte, “malortodoksa”. Nun la kristana eklezio certe faras multegajn bonajn aferojn – helpas malriĉulojn, starigas hospitalojn, savas homojn de naturkatastrofoj, antaŭenigas pacon kaj faras multegajn pliajn bonajn aferojn. Sed, bedaŭrinde, ne ĉiam estis tiel... Dum multaj jarcentoj la agoj de la eklezio ĉiel kontraŭdiris ĝiajn instruojn: ĝi kun fervoro ekstermis ĉion, kio ne konvenis al ĝiaj “oficialaj” dogmoj kaj kio povis malgrandigi ĝian influon. Ĝi ankaŭ ĉiel malhelpis la disvastigon de scio. Sciencistoj, saĝuloj, kuracistoj kaj simplaj alipensantoj – viroj kaj virinoj – estis nomataj “herezuloj” (kaj laŭvorte tio ja signifas “alipensanto”), ili estis persekutataj, turmentataj kaj ofte terure mortigataj, kiel vivbruligita Giordano BRUNO... La scio, kiun dum multaj jarmiloj antaŭenigis misterskoloj de la antikvaj civilizacioj, en grandega parto de nia mondo estis oficiale anstataŭigita per la “sola korekta kredo”...

Universitatoj de la antikveco

Sed mi revenu al nia temo. La misterskoloj (“esoteraj skoloj”, laŭ H. BLAVACKI*, aŭ simple “misteroj”) estis grandaj publikaj organizaĵoj de la antikva tempo, ofte subtenataj de la ŝtato. Ili estis centroj de la nacia kaj religia vivo, en kiuj studis miloj da homoj. Iusence ili estis la unuaj universitatoj de la antikveco. Oni studis tie la leĝojn de la naturo kaj la kosmo, disvolvis sian personecon kaj kaŝitajn kapablojn, ellaboris la filozofion.

“Tiu, kiuj sukcese trapasis la gradojn de la misteroj – kaj tio ĉi estis multjara procezo – fariĝis tio, kion ni nomas alt-edukitaj kaj kulturitaj viroj kaj virinoj, kun la aldona scio pri la mondo, kun la kompreno pri la vivo post la morto, pri la loko de la homo en la skemo de la aferoj kaj sekve kun la kompreno pri tio, kion indas fari kaj por kio indas vivi”, – skribis C.W. LEADBEATER (1847-1934), instruisto de la Teozofia Societo kaj iama anglikana pastro, en *The Hidden Life in Freemasonry (La Kaŝita Vivo en Framasonismo)*. Multaj saĝuloj kaj sciencistoj de la antikveco (Pitagoro, Platono, Aristotelo, Aristofano, Cicero, Plutarĥo) estis inter la inicitoj de la misterskoloj. Estis inter la inicitoj ankaŭ multaj famegaj religiaj figuroj – Zoroastro, Moseo, la reĝo Salomono, Jesuo...

Malgraŭ la ofta miskredo, misterskoloj tute ne estis plene sekretaj societoj, ja ili estis malfermitaj al la ĝenerala publiko. Nur la *heredantoj* de la misterskoloj devis fariĝi sekretaj societoj, kiam la Eklezio komencis severe persekuti ilin. Sed la plej grandaj sekretoj de la misterskoloj, tamen, ne estis malfermitaj al ĉiuj. Scio estas povo, kaj oni transdonis tiun povon nur al la plej indaj, sinceraj, saĝaj, sindediĉaj kaj bonkoraj homoj, kiuj povus saĝe uzi tiun ĉi povon. Ene de la misterskoloj ofte estis du rondoj – interna (esotera) kaj ekstera (ekzotera). Dum la ekstera rondo estis malfermita al pli-malpli ĉiuj, pri la esotera rondo sciis nur malmultaj inicitoj. Efektive, oni ne povis laŭvole eniri la internan rondon: la majstroj de la skoloj mem invitis la plej indajn homojn. La ĝenerala publiko kaj eĉ la inicitoj en la eksterajn rondojn ne sciis pri la ekzisto de la interna rondo. Tio estis tre saĝa: ja se iu ne inda, sed ambicia estro volis esti incita en la misterojn, por ke aliaj konsideru lin klera (se oni neus, li povus fizike detru la tutan skolon), li povis esti en la ekzotera rondo, kaj neniu granda sekreto estis malkaŝita al li.

Inicitoj kaj profanoj

Estas interese, ke ni ĉiuj uzas vortojn, kiuj originas el la misterskoloj, sen eĉ pripensi tion! Ni komencu ekde la vortoj “mistero” kaj “mistiko”, kiuj cetere ofte estas k o n - fuzataj. Ili devenas de la sama origino – de la eleŭziasaj

misterskoloj en Grekio. La greka vorto “mysterion” (en la latina ĝi fariĝis “*mysterium*”) signifas “sekreta rito”. Ĝi devenas de la vorto “mustes” – “inicito”, kiu siaflanke venas de “muein” – “fermi [la okulojn]”, “inici”. La radikaj sonoj “mu”, verŝajne, venas de la sono, kiun oni faras kun fermita buŝo. En *La Konciza Etimologia Vortaro* de A. CHERPILLOD estas rimarko, ke ankaŭ en la hebrea troviĝas la vorto “mistar” kun la sama signifo – “mistero”, “sekreto”.


Ankaŭ la originalan signifon de la misterdevenaj vortoj “inici” kaj “iniciati” lingvema esperantisto facile trovos. Ĝi venis al ni de la latina “iniciare” (“komenci”, “inici”), kiu siavice venas de “in” + “ire” – “eniri”. Jes, tiel facile!

Alia interesa vorto estas “profano” aŭ “profani”, kiu eniris multajn lingvojn. En la rusa, ekzemple, la vorto “*profan*” signifas “neprofesiulo”. En la angla la verbo “*profane*” [profejn], same kiel en Esperanto “profani”, ofte estas uzata en la senco “malobservi sanktecon de religiaĵo” aŭ simple “malobservi la respekton”. En Esperanto, la vorto “profano” havas sian originalan signifon: “tiu, kiu ne estis incita en sanktaĵon”, “ne konsekrita”. Ĝi venas de la latinaj “pro” – antaŭ (en la senco “ekster”) kaj “fanum” – templo, konsekrita loko.

La egiptaj misterskoloj

Egiptaj misterskoloj estas antikvegaj kaj, verŝajne, la plej konataj inter ĉiuj misterskoloj de la antikva tempo. Laŭ multaj fontoj, la fondinto de la egiptaj misteroj estis Toto Trismegisto (t.e. trioble grandega), kiu “venis kun fajro”. La egipto poste ekkonsideris Toton Trismegiston dio de scienco. Al la antikvaj grekoj li estis konata kiel Hermeso – oni konas lin de la mito, en kiu li ŝtelis la fajron de la dioj. Sed certe ĉi tie, same kiel en ĉiuj aliaj mitoj, fajro estas nur alegorio por la scio, la interna lumo.

devenas de la sama origino – de la eleŭziasaj





Li instruis, ke la lumo estas universala, kaj ke lumo (kiu estas Dio) vivas en la koro de ĉiu homo. Inter la artoj kaj sciencoj, kiujn li malkovris al la homaro, estis ĥemio, juro, pentroarto, muziko, retoriko, filozofio, matematiko, anatomio kaj oratora arto. Li estis aŭtoro de pluregaj libroj (laŭ Iamblichus – 20 mil libroj, sed tio certe povas esti nur alegorio). Interese, ke ĝis nun konserviĝis la vorto “hermeta” – perfekte fermita, aŭ tre malfacile penetrebla por la intelekto. Tio, plej verŝajne, okazis dank’ al la mezepokaj alĥemiistoj, kiuj multilaterale transprenis la sciojn de la antikvaj mister-skoloj en la malluma mezepoko.

En Antikva Egiptio estis du ĉefaj specoj de misterskoloj – la Pli Grandaj kaj Malpli Grandaj misteroj (ili ambaŭ havis internan – esoteran, kaj eksteran rondojn). Malpli Grandaj Misteroj estis dediĉitaj al la diino Iziso – la Tutmonda Patrino, edzino de Oziriso kaj la patrino de Horuso, kiu estas la alegorio por la homaro. Estas konate, ke oni severe testis la kandidatojn por esti iniciata en la internajn misterojn; antaŭ la testado okazis simbola banado (de kiu, plej verŝajne, venas la kristana bapto). Se oni volis fari nur intenan “kulturkurson” en la ekstera rondo, oni faris tion sen ajnaj testoj.

La Pli Grandaj Misteroj konsistis el la Misteroj de Serapo kaj – la plej alta grado – la Misteroj de Oziriso. La celo de la Misteroj de Serapo estis regado kaj trejnado de la menso, kaj la Misteroj de Oziriso iris eĉ pli profunden, kun la celo akiri plenan konscion de la memo sen ajnaj limigoj.

La grekaj misterskoloj

Eleŭziasaj misterskoloj estas la plej konataj misteroj de Antikva Grekio. Multegaj elstaraj filozofoj de Antikva Grekio estis iniciataj en ilin. La moderna mondo scias malmulte pri tiuj ĉi misteroj – unue, ĉar ĉiuj instruoj estis tre bone gardataj: la malkaŝo de la misteroj estis granda peko. Aliflanke, en la frua kristanismo oni ĉiel strebis “nigrigi” kaj eĉ plene detruiri la misterskolojn kiel parton de la pagana kulturo. Post kiam kristanismo adoptis multajn paganajn simbolojn kaj festojn (donante al ili novan signifon), ĝi ĉiel penis distanciĝi de la misterskoloj, de kie ili originas.

Laŭ la helena aŭtoro, la fondinto de la grekaj misteroj estis Orfeo – tiu sama “sorĉa muzikisto, kiu malsupreniris en Hadeson por de tie revenigi sian edzinon Eŭridicon”. Simile al multaj saĝuloj de la pasinteco, li eniris folkloron kaj mitojn. Same kiel la egiptaj, la eleŭziasaj misteroj estis dividitaj en la Malpli Grandajn kaj Pli Grandajn Misterojn. La Malpli Grandaj Misteroj estis festataj en marto, en la templo de Demetro en Agrao; la Pli Grandaj Misteroj estis festataj en septembro en la urbo Eleŭziso, apud Ateno.

Al la eleŭziasaj misteroj (kaj Malpli, kaj Pli Grandaj) estis iniciataj dekoj da miloj da homoj – antikva historiisto mencias kolek-

tiĝon de tridek mil iniciatoj! Fakte, ĉiuj seriozaj viroj kaj virinoj de Antikva Grekio iris al tiuj misteroj. Tiutempaj aŭtoroj vaste priskribis tiujn grandajn amasajn publikajn procesiojn, sed estas konata nenio pri tio, kio okazis malantaŭ la pordoj de tiuj ĉi misteroj... Estas tamen konate, ke, same kiel en Egiptio, en ambaŭ Misteroj estis la interna rondo de la iniciatoj.

Famega helena sciencisto kaj filozofo Pitagoro estis iniciato de la eleŭziasaj mister-skoloj. Li studis ne nur en Grekio, sed ankaŭ en Egiptio kaj Azio, kaj poste fondis sian propran skolon. Laŭsignife ĝi estis misterskolo, sed sen ceremonioj. Por esti akceptita al lia lernejo oni devis scii almenaŭ la bazojn de matematiko.

Por mi longan tempon estis enigmo, kiel antikvaj grekoj povis havi tiel disvolvitan filozofion kaj ĝeneralajn sciojn, kaj samtempe tiel kaosan religion, kun ĉiam kverelantaj dioj ktp. Sed la afero estas, ke *saĝaj homoj* neniel kredis mitojn! Kleraj homoj estis iniciatoj de misterskoloj kaj ofte membroj de iu filozofia skolo – aŭ ili povis havi sian propran filozofion. Kompreneble, estis homoj, kiuj laŭvorte kredis je ĉiuj mitoj – same kiel la nunaj “vortvortistoj” ne komprenas alegoriojn kaj kredas, ekzemple, ke la universo estis kreita laŭvorte dum ses tagoj, ke Evo manĝis la pomon, kaj pro tio oni devas suferi aŭ ke Esperanto mem estas peko pro la babeltura historio... Sed oni ankaŭ ne neglektu la mitojn – ofte ĝuste ili donas al ni malrektajn aludojn pri tio, kio okazis kaj kion oni instruis en la misterskoloj.

La hebreaj misterskoloj

La hebreaj misterskoloj en multaj rilatoj heredis la tradiciojn de la egiptaj misteroj – eĉ la Biblio diras, ke “Kaj Moseo estis instruita en la tuta saĝeco de la Egiptoj” (Agoj, 7, 22). Laŭ multaj fontoj, Moseo estis iniciata en la egiptajn misterskolojn kaj profunde konis la monoteismon enkondukitan de la faraono Aĥenatono (li estis la unua, kiu faris monoteismon oficiala ŝtatar religio). Estas plej verŝajne, ke ĝuste Moseo estas la fondinto de la Hebreaj Misteroj. La reĝo Salomono estas tre grava figuro en la hebreaj misteroj. Krom tio, ke li estis tre saĝa persono, li mem estis iniciato de la misterskoloj. Kaj ĝuste li konstruigis la Unuan Templon, kiu fariĝis la centro de la hebrea religio kaj nacia unuiĝo.

Ne estas spaco rakonti pri la romiaj, mitraaj, kretaj, druidaj kaj pluraj aliaj misterskoloj, nek pri la neniigitaj kristanaj misteroj, nek pri tio, kiel la scioj de la misterskoloj estis transdonataj tra la jarcentoj... Eble iam poste!

* Helena Petrovna BLAVACKI (BLAVATSKY) (1831-1891) – fondinto de la Teozofia Societo





“Ĝi estas ne “projekto”, nek “fantazio” – sed konkrete funkcia ekzemplo, ke alia mondo eblas!”

Bona Espero

Oni kredas ĝenerale, ke esperantistoj estas izolitaj intelektuloj, kiuj entute ignoras la malsaton kaj la mizeron en la Tria Mondo. La ekzemplo de la bieno-lernejo *Bona Espero* en Brazilo montras, ke tio ne veras. En tiu forlasita regiono esperantistaj volontuloj el multaj landoj montras, ke la plej kruelaj sociaj diferencoj povas esti venkitaj per sindediĉo kaj laboro favore al infanoj en granda mizero, sub la signo de Esperanto kiel forta instrumento de homa solidareco.

Bona Espero estas neregistara organizajo, fondita de ses brazilaj esperantistoj en la jaro 1957 kaj funkcia ekde tiam. Pro sia socia eduka agado *Bona Espero* estas konsiderata institucio de publika federacia utileco. La bieno-lernejo troviĝas en Goiás, unu el la 27 ŝtatoj de Brazilo, 250 km norde de la ĉefurbo Braziljo. Ĝia tereno konsistas el 950 hektaroj da savano. La bieno situas 1200 metrojn super la marnivelo, sur la 14-a paralelo sude de la ekvatoro, en tropika regiono de Centra Brazilo – tamen, la altitudo mildigas la temperaturon en la somero, kaj dum la tuta jaro ĝi estas inter 20 kaj 30 gradoj C.

Bonan Esperon gvidas estraro el kvin esperantistoj, kiuj respondecas antaŭ la registaraj instancoj pri korekta administrado kaj funkci-

ado. La vivo en la bieno baziĝas esence sur ses konceptoj:

1. **Vivkvalito** de la loĝantoj, karakterizata per konscia mediprotekto; agrikulturo por memsufiĉo, karakterizata per grandkvanta produktantado (por propra konsumo) de fruktoj kaj legomoj; pura akvo el propra fonto; pura aero pro la situo en nacia parko, grandaj spacoj.

2. **Socia agado** realigata de la plenkreskaj loĝantoj kaj volontuloj el la tuta mondo, plejparte esperantistoj. Infanoj kaj adoleskantoj, kies vivo estis en serioza riska situacio, estas protektataj, edukataj kaj ricevas lernejan instruon ĝis la fino de la mezlernejo. Tiuj gejunuloj venas al *Bona Espero* laŭ la decido de ŝtata juĝisto – plejparte ili estas viktimoj de siaj propraj familioj pro alkoholo kaj aliaj drogoj aŭ estas simple orfoj de la kvin urbetoj de la regiono.

3. **Esperanta kulturo** vivas en la bieno-lernejo ĉiutage kaj tre aktive. Volontuloj loĝas inter la infanoj, ĝenerale, dum kelkaj monatoj kaj uzas Esperanton dum la ĉiutagaj aktivecoj – pro tio Esperanto estas ne studobjekto, sed normala ĉiutaga lingvo apud la portugala.

4. **La lernejo** funkcias kiel filio de la publika urba lernejo ĝis la kvara elementa klaso por la loĝantaj infanoj kaj infanoj, kiuj venas el la regiono, ofte sur kelk-kilometraj teraj vojetoj. Post la kvara klaso, la infanoj daŭrigas la lern-

adon en la urba lernejo en la urbeto Alto Paraiso, je 20-kilometra distanco. En tiu granda domo funkcias ankaŭ daŭra Esperanto-kurso por interesitoj el la urbo.

5. **Kontakto kun esperantistoj en Eŭropo** estas en la nuna periodo esenca, ĉar la Brazila Ŝtato donas malpli ol kvin procentojn de la necesaj financaj rimedoj por vivteni la infanojn. En Germanio funkcias ege aktiva grupo de bonvolaj esperantistoj, kiuj per la plej interesaj agadoj dum la lastaj 25 jaroj kolektis kaj daŭre kolektas monon por la konstruado de kvin grandaj loĝdomoj, por akvoprovizo kaj elektroinstaladoj, transporto kaj aĉetado de tiuj nutraĵoj, kiujn oni ne povas produkti en la bieno mem.

6. **Eduka Politiko.** En la eduka kampo inter la prioritatoj de la estraro estas la instruado pri mediprotekto, pri novaj teknologioj (kiel elektro per sunpaneloj, fornoj funkciaj per nura sunenergio, recikligo de rubaĵo, hortikulturo* laŭ la plej ekologiaj konceptoj) kaj, evidente, edukado pri mondĉivitaneco, libera pensado, respekto al kultura pluralismo, instruo pri religiaj diversecoj sen devigo al tiu aŭ alia.

Bona Espero konsideras sian edukan laboron kiel “preventan medicinon” en la lando, kie milionoj da homoj malsatas kaj kie milionoj da infanoj vivas surstrate. Fakte, *neniu* eksa lernanto de *Bona Espero* vivas surstrate aŭ ne kapablas majstri sian propran familian vivon.

Inter la kelkaj centoj da infanoj, kiuj havis la ŝancon vivi kelkajn jarojn en *Bona Espero*, multaj sukcesis fini la mezlernejan edukadon – pli ol dudek estas instruistinoj en la urbaj lernejoj aŭ funkciuloj en publikaj departementoj.

Evidente, la agado de *Bona Espero* havas apenaŭ lokan dimension. Ĝi estas modesta kaj certe ne savas la mondon, sed ĝi estas tre vigla, pozitiva ekzemplo de homa solidareco, de internacia solidareco de Esperanto-parolantoj tra la kontinentoj kaj, antaŭ ĉio, ĝi estas ne “projekto”, nek “fantazio” – sed konkrete funkcia ekzemplo, ke alia mondo eblas, se respondecaj viroj kaj virinoj sin dediĉas en decaj kondiĉoj al la edukado de la junularo, sen konsumismo kaj en intima rilato kun la naturo.

Multaj TEJO-anoj jam donis sian kontribuon en la lastaj 20 jaroj al tiu laboro, kaj oni povas konsideri *Bonan Esperon* kiel propraĵon de la Internacia Esperanto-Movado.

* hortikulturo – la metio kultivi plantojn (precipe ĝardenajn)



La soleca poetino de la nokto

Vladimir MASALKIN, Rusio

Mi konatiĝis kun ŝia poezia verkaro ĝuste tiam, kiam en la 1980-aj jaroj en la sovetia tagjurnalo *Komsomolskaja Pravda* aperis artikolo pri tre juna poetino. Tiu estis la knabino Nika TURBINA, naskiĝinta en 1974 en Jalto (Krimeo, nuna Ukrainio). La tralegitaj kurtaj versaĵoj tuj tuŝis mian koron kaj lasis en ĝi profundan impreson.

La versaĵoj estis tiom allogaj kaj kortuŝaj, ke mi estis preta legi ilin ĉiutage. Kaj mi legis ilin. Kaj ju pli multe mi legis ilin, des pli forte ili plaĉis al mi. Tiutempe mi aktive okupiĝis pri Esperanto, kaj mi decidis traduki kelkajn poemojn de la knabino.

Du versaĵoj el la deko de publikigitaj en la tagjurnalo tiutempe aparte plaĉis al mi, kaj mi tuj provis traduki ilin. Ĉio ĉi rezultis bone! Sed ĝis nun mi ne tradukis pliajn versaĵojn de Nika. Tiutempe aperis ŝia unua libreto *Ĉernovik – Malneto**, tiam ŝi estis nur 9-jaraĝa. Bedaŭrinde, mi ne povis trovi ĝin. Ĉiuj miaj klopodoj restis vanaj – la 30-mil (!) ekzempleroj de poezilibreto estis tuj elacetitaj!

Feliĉe, nun en la interreto aperis multaj versaĵoj de N. TURBINA. Mi trovis ilin lastjare en la interreto ĝuste tiutage, kiam la juna poetino mortis. Mi ne sciis, ke ŝi jam forpasis antaŭ kelkaj jaroj (ŝi mortis en 2002). Kio tio estis? Ĉu koincido aŭ laŭleĝeco? Kial mi decidis trovi la poemojn de Nika ĝuste tiutage? Mi ĝis nun ne povas respondi la demandon. Mi ofte legas kaj relegas ŝiajn versaĵojn, penante kompreni, kio helpadis al ŝi verki tiajn poemojn.

Lastatempe, kiam mi relegis la versaĵojn, mi rimarkis, ke Nika ĉiam skribis pri la Tago en la pasinta tempo, kvazaŭ la Tago finiĝis por ŝi. La rezultoj de la travivita Tago ne ĝojigis ŝin, kaj pri Nokto ŝi skribis en la nuntempo, kvazaŭ ŝi vivas en ĝi. La nokto timigis ŝin per sia necerteco, sed samtempe la nokto ĝojigis ŝin. Ŝi amis la nokton. Ŝi skribis:

*La nokton amas mi
pro la soleco.*

Sed ŝi estis deprimata de soleco. Ŝi bezonis patrinan amon, patrinan kareson. Bedaŭrinde, ŝi ne ricevis tion plene en la infanaĝo. Ŝi konfesis en unu el siaj verkoj, ke homoj ne ĉiam komprenas unu la alian kaj ofte parolas diversajn lingvojn:

*Diversajn lingvojn
ni parolas nune,
Literoj – samaj,
sed la sent' forestas.
Kaj malgraŭ tio,
ke ni loĝas kune,
Distanco granda
inter koroj restas.*

Kaj ŝi esprimis en siaj verkoj tiajn tute ne infanajn pensojn, ŝi eldiris sian opinion pri multaj vivaj faktoj tiel, kvazaŭ ŝi estis matura kaj sperta homo:

*Rompita flor'
Ne kreskos plu por vi,
Kaj mortigita font'
Ne donos al vi akvon.*

En la versaĵoj ŝi starigis antaŭ si la demandojn: “Kio estas mi kaj kio restos post mi?” Mi ne ĉesas miri, kiam mi legas ŝiajn versaĵojn! Kaj ĉiufoje mi trovas en ili ion tute novan por mi mem.

Ŝi komencis verki ankoraŭ sen la scipovo skribi. En la infanaĝo ŝi ofte vekigis nokte kaj petis sian patrinon tuj surpaperigi la versaĵojn, kiujn ŝi ĵus verkis (ŝi havis astmon kaj ofte ne povis dormi). En ŝiaj infanjaraj versaĵoj estis lamentoj pri la soleco kaj foresto de geamikoj. Nika ege bezonis geamikojn. Ŝi volis trovi ilin, sed... Ŝi skribis pri tio en unu el siaj fruaj poemoj:

*Amikojn serĉas,
Kiujn perdis mi...*

Kaj same ŝi volis trovi vortojn, kiuj mankis por verki poemojn:

*La vortojn mi
Serĉadas en forkur'.*

Ŝi serĉis ankaŭ tagojn. Ŝajnis, ke tagoj neglektas ŝin kaj forkuras ien preteren. Sed ŝi volis vivi en la tagoj. La tagoj allogis ŝin, sed ili kuris tiel rapide, ke ŝi ofte ne sukcesis kompreni, kio okazis tage, kion kunportis la tago por ŝi. Ŝi ne sukcesis senti la ĝojon de la Tago. Ŝi revis pri la taga vivo! Ŝi skribis:

*La tagon serĉas
Mi. Sed ĝi forkuris.*

Nika verkis multajn “blank-

ajn” versaĵojn. Ili ne havas koncizajn rimojn, sed ili estas tre ritmaj kaj belsonaj. Kaj iumomente ŝajnis, ke ŝi bezonis la rimon. Pri tio ŝi petis la Dion en unu el la poemoj, preta fordoni sian koron por sukcesa rimo:

*Prenu vi koron
Mian donace
Por la flughava rim-par'.*

Ŝi verkis pri tio, kio dolorigis kaj turmentis ŝin. Ŝiaj verkoj naskiĝis kun doloro kaj sopiro. Iam poste ŝi skribis:

*Ne verkas plu versaĵojn mi –
Ĉar mankas la sopiro.*

Ŝi konsideris sian vivon kiel malneton. Estas mirinde, ke tre juna, ankoraŭ okjaraĝa knabino povis pri tio skribi tiel:

*Mia vivo – malnet',
Sur ĝi stele
Aspektas literoj.
Grizaj tagoj de l'viv'
Estas jam
Kalkulitaj por mi.*

*Mia vivo – malnet'.
Malsukcesoj
Kaj ĉiuj prosperoj
Sur ĝi restas
Sankiel*

Repafe rompita la kri'.

Kaj fakte ĝuste tiel okazis. Estis multaj helaj kaj grizaj tagoj en ŝia vivo, estis sukcesoj kaj fiaskoj, ĝenerala rekono en nia lando** kaj soleco, estis tre fama internacia poeta premio kaj foresto de geamikoj. En nia lando tiun gravan premion – la Ora Leono – ricevis nur du homoj – la fama Anna AĤMATOVA, kiam ŝi havis 60 jarojn, kaj Nika TURBINA, kiam ŝi estis nur 11-jaraĝa! Estas ligita al tiu premio interesa historio. Eta Nika volis ekscii, ĉu la Ora Leono vere estas ora kaj, reveninte hejmen, rompis la statueton per martelo. Ĝi estis gipsa...

Ŝi mortis subite en juna aĝo, antaŭ sia 28-jariĝo. La novaĵo pri ŝia morto por homoj, kiuj konis ŝian poemaron, estis vera pafado en koron. Kiam mi eksciis pri ŝia morto, en mia animo ektondris la krio, kaj mi verkis la poemon en la rusa lingvo memore al Nika.

Nun mi skribis nur parton de tio, pri kio mi volus rakonti. La knabino estis tre talenta, kaj ŝia talento estis multfaceta. Endas esplori la kreaĵon de la knabino

por kompreni, kio maltrankviligis ŝin, pri kio ŝi pensis, kiel ŝi sentis la vivon. Pluraj ŝiaj versaĵoj povas rakonti multon interesan al ni, ĉar ŝi havis sian neordinaran rigardon al la vivo. Konatiĝante kun la verkaro, ni povas malkovri por ni mem ion nekonatan kaj novan. La poemaro de la knabino estas vera trezoro por poezi-amantoj. Mi kredas, ke iam ĉiuj ŝiaj poemoj estos tradukitaj en Esperanton kaj en aliajn lingvojn, por ke ĉiu homo povu ĝui la veran kaj belan Poezion! Mi esperas!

Aldone

La frapa, nekredbla talento de la juna Nika (iuj eĉ opiniis ŝin estaĵo de alia planedo, aliaj rifuzis kredi, ke ŝi mem verkas), ŝia malorda vivo, suferoj animaj kaj fizikaj kaj tro frua morto elvokis multajn artikolojn en la gazetaro kaj raportojn en la televido kaj radio – dum ŝia vivo oni eĉ faris du filmojn pri Nika. Ankaŭ ŝia morto starigis multajn demandojn. La oficiala versio estis sinmortigo – ŝi ja kelkfoje provis mortigi sin: prenis grandegan kvantojn de dormigaj drogoj, tranĉis la vejnojn kaj eĉ saltis de la kvina etaĝo, kio kaŭzis al ŝi multajn traŭmatojn kaj neelteneblajn dolorojn. Tamen estas multaj kontraŭdiroj en tiu ĉi historio. Unue – ŝiaj krioj pri helpo. Due, en la medicina ĵurnalo la kialo de ŝia morto estas indikita “traŭmato”. Kaj poste estis farita aldono: “Falo de la kvina etaĝo, la loko, la kialoj kaj la cirkonstancoj de traŭmato ne estas konataj”... – Red.

* tiun ĉi nomon helpis elekti al ŝi fama sovetia kaj rusia poeto Eugeno EVTUŜENKO; tiel nomiĝis la ĉefa versaĵo de la libro, kaj krome EVTUŜENKO opiniis, ke “la infano estas malneto de la homo”. Li tre antaŭenigis Nika-n kiam ŝi estis tre juna, sed poste li ne plu okupiĝis pri ŝi, kaj Nika dolore sentis tion kaj konsideris tion perfido – Red.

** Nika TURBINA estis konata ankaŭ eksterlande – ŝiaj versoj estas tradukitaj en 12 lingvojn, ŝi kolektis homplenajn halojn en Italio kaj en Usono. En la fama Kolombia Universitato en Usono eĉ estis konferenco pri la tekniko traduki la versojn de la juna poetino el Sovetunio – Red.



La reĝino de Ŝebao estis senmort-ig-ita en la Biblio kaj Korano. Ŝi aperas en malnovaj turkaj kaj persaj pentraĵoj, en la fruaj kristanaj verkoj kaj en la artaĵoj de famegaj artistoj. Ŝia vivo eĉ inspiris hollywoodan filmon en 1959! Oni rakontas kaj rerakontas ŝian historion en pluraj landoj jam preskaŭ tri mil jarojn – sed kiu estis ŝi, tiu virino kun grandega povo, kaj ĉu ŝi ekzistis entute?..

Olivier GAUDEFROY, Francio

Araboj nomis ŝin Bilkis, etipoj – Makeda. En la Biblio (Reĝoj, I, 10) kaj Korano (Surao, XXVII) ŝi aperas kiel la reĝino de Ŝebao – **pagana** reĝino, kiu iris al Jerusalemo por viziti la reĝon Salomonon (li regis en ĉ. 970-932 antaŭ Kristo). **Arĥeologoj** trovis la ŝebaan (“sabaan” arabe) reĝlandon en la nuna Jemeno, kun la ĉef-urbo Marib. Estis malkovrita tie ankaŭ malnova **Templo** de Bilkis. Tiu ĉi reĝlando ekzistis de la 8-a jarcento a.K. ĝis la 6-a jarcento p.K., ĝis kiam persoj kaj poste araboj **konkeris** ĝin. Akvo-barado kaj **karavana** komerco (precipe pri **incenso**, kiun oni multe uzis en Egiptio, Sirio kaj

Babilonio por religiaj celoj) permesis ĝian dis-floron.

La reĝino de Ŝebao regis sola. Laŭ iuj tradicioj, ŝi estis el-stara reĝa filino, laŭ la aliaj, ŝi estis **vidvino**. Bilkis kaj ŝia popolo praktikis stelan religion – eble ili, same kiel egiptoj, kredis je la sun-dio Reo. Iuj opinias, ke ŝia popolo estis malkontenta pri siaj dioj, kiuj “ne defendis la popolon kontraŭ la malfeliĉoj”, kaj tiel la reĝino decidis forlasi ilin por “pli defendema diaĵo”. Sendube, la komercistoj de Ŝebao rakontis al Bilkis pri la religio de la proksimaj landoj, kaj tiel ŝi konatiĝis kun la **legenda** saĝo de la reĝo Salomono kaj kun la kredo je unusola dio. Laŭ la kristanaj fontoj, la reĝino decidis iri al Jerusalemo por elprovi la saĝon de Salomono. Ŝi irigis kun si tri mil **kamelojn**, kiuj kunportis valoregajn ŝtonojn, incenson, multege da oro (laŭ la Biblio – pli ol kvar mil kilogramojn!) kaj pluregajn servantojn. Bilkis interparolis kun Salomono pri ĉio, kion ŝi deziris, kaj elprovis per diversaj malfacilaj demandoj lian saĝon – sed Salomono havis la respondon al ĉiu ŝia demando. La reĝino estis

kontenta kaj revenis al sia lando kun multaj donacoj. Tamen, oni ne scias, ĉu ŝia popolo akceptis la najbaran religion.

En la islamaj legendoj, la reĝo Salomono aŭdis pri la riĉega reĝino de la najbara lando kaj mem invitis ŝin. Li speciale por ŝi konstruigis grandan **palaco**n kun vitra planko kaj muroj. Kiam ŝi eniris, ŝi pensis ke sur la planko de la palaco estas akvo kaj iom suprenigis la robon por ne malsekigi ĝin – kaj tiel la reĝo Salomono subite ekvidis ŝiajn harajn kruojn...



Afrika legendo parolas

pri geedziĝo inter Salomono kaj la reĝino de Ŝebao kaj la naskiĝo de ilia filo, Meneliko. Estis li kiu poste, laŭ alia legendo, ŝtelis la Keston de Interligo* de la Templo de Jerusalemo. La etiopia kristana tradicio, cetere, baziĝas sur la legendo, ke ĝuste la reĝo Salomono kaj la reĝino de Ŝebao fondis la reĝan familion de Abisenio (nuna Etiopio). Sed en tiu ĉi historio estas multaj malklaraĵoj. La unua etiopia reĝlando, trovita de arĥeologoj, ekzistis

inter la kvina kaj la tria jarcento a.K., sed la vizito de Bilkis al Jerusalemo devis okazi multe pli frue, ĉirkaŭ 950 a.K. Povas esti, ke *alia* reĝino de Ŝebao, kiu vivis multe pli poste, en 5-3-a jarcentoj a.K., naskis Menelikon, sed tiukaze Salomono ne povas esti lia patro. Ĉar alie Bilkis devis fariĝi senmorta kaj naski la filon multajn jarcentojn post la vizito al la reĝo Salomono.

* la Kesto de Interligo – sanktaĵo laŭ juda kaj kristana tradicioj, kiu entenis dum la bibliaj tempoj du ŝtontabulojn de la Dek Ordonoj, kiujn ricevis Moseo de Dio

Bildo: "La vojaĝo de la reĝino de Ŝebao", Apollonio di GIOVANNI di TOMASO (ĉ. 1416–1465).

arĥeologio (arĥeologio) – scienco pri artoj de malnovaj tempoj
incenso – bon-odor-igilo
inspiri – estiĝi, en la menso de alia persono, penson, planon, agon
kamelo – dezerta besto kun du montet-similaj elkreskaĵoj sur la dorso
karavano – kamel-aro
konkeri – preni per forto
legendo – rakonto
pagano – tiu, kiu kredas je multaj di(a)oj
palaco – reĝa aŭ reĝina domo
templo – granda religia konstruaĵo
vidv(in)o – tiu, kies edz(in)o mortis, kaj kiu ne plu geedziĝis

Kubo: belega insularo en la Kariba Maro

Ariadna GARCIA GUTIÉRREZ, Kubo

Ĝi estas tre speciala lando kun belegaj floroj kaj bestoj, altaj arboj ĉirkaŭ la domoj, en parkoj kaj larĝaj stratoj. La reĝa **palmo** beligas la tutan **pejzaĝon** de la **arkipelago**. Ĝi havas belajn plaĝojn kun bluega akvo, kie la suno brilas la tutan jaron kaj la aero tuŝas la vizaĝon de la pied-irantoj.

La nomo “Kubo” devenas el la loka vorto “Ciba”, per kiu la praloĝantoj konataj kiel tainoj celis “ŝtono”, “monto”, “**kaverno**”. Tion ni scias de la tag-libro de Kristoforo KOLUMBO.

Ĝia nacia floro estas **Papili-**

floro (*Hedychium Coronarium*). Oni nomis ĝin tiel en la jaro 1936 – tiu ĉi floro estas **simbolo** de **ribelemo**, kiun la virinoj portis sur la brusto en la sendepend-ecaj bataloj kontraŭ la hispana **koloniismo** en la 19-a jarcento. Ĝiaj blankaj **petaloj** simbolas purecon de ide-aro kaj pac-amon; kelkaj floroj kune sur la sama **spiko** memorigas ke unuigo estas forto; la vira parto de la floro **protektas** en **tubo**-forma **sulko** la inan parton, kio reprezentas la ĝentilecon, estimon kaj mal-**avaremon** de la kubanoj rilate la virinojn.

Kubo estas la plej granda

arkipelago en la antila insularo, kaj ĝia plej granda insulo same nomiĝas “Kubo” kaj longas 1250 kilometrojn. La vetero de la lando estas kvazaŭ ĉiama somero, tio estas ĉ. 28° C. Por ŝatantoj de la maro, suno kaj naturo Kubo estas la insulo de la **revoj**.

arkipelago – insularo
avara – kiu tro ŝatas monon
kaverno – subterejo
kolonio – (ĉi tie) venkita teritorio (koloniismo)
palmo – arbo, kiu kreskas en varmaj lokoj
papilio – bela insekto kun kvar



grandaj flugiloj
protekti – defendi
pejzaĝo – vido
petalo – flor-folio
revi – pripensi tion, kion oni deziras
ribeli – malobei la registaron (ĉi tie: koloniantojn)
simbolo – plej grava prezentaĵo, signo
spiko – loko, de kiu kreskas floroj
sulko – profundaĵeto
tubo – long(et)a malplenaĵo



Nekutima gasto iranta al la preleg-ĉambro

Dum Esperanto-kongresoj ĉiam okazas interesaj aferoj. Foje venas nekutimaj homoj, okazas nekutimaj prezentoj ktp. Sed ĉu vi iam renkontis “gaston el la pasinteco”, kiu speciale venis por prelegi dumkongrese? Mi – jes! La renkontiĝo kun la nekutima vizitanto okazis somere 2005 en Aŭstino, Teksaso, dum la landa kongreso de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko. Frato D. estis tiel afabla ke li eĉ konsentis, malgraŭ sia terura okupateco, doni intervjuon por KONTAKTO!

– *Saluton, kaj dankon ke vi trovis iom da tempo por rakonti pri via vivo! Kie fakte vi loĝas?*

– Tiel simpla demando havas nesimplan respondon. Unu aŭ du noktojn ĉiumonate mi loĝas en mia dometo, kiu situas apud rivero, dudek mejlojn okcidente de Dalaso, Teksaso. Ĝi estas tre malimpona domo. Mia vera hejmo estas la kampo mem; foje ŝajnas ke mi loĝas sur la dorso de Kapitano, mia forta ĉevalo. Plejparte mi tranoktas en la domoj de bonkoraj amikoj dum miaj malfacilaj vojaĝoj. Mi kalkulas, ke mi trarajdis sur ĉevalo 250 mil mejlojn dum mia vivo ĝis nun. Kapitano estas mia dek dua ĉevalo.

– *Ĉu Teksaso estas ŝtato de Usono aŭ aparta lando?*

– Nun, en 1861, Teksaso estas ŝtato de Usono, sed... mi aŭdas, – oni diras, ke baldaŭ Teksaso estos parto de alia lando, la “Sudo”. Tio estas grupo de ŝtatoj, kiu eliras el Usono kaj kreas alian landon – Konfederacion de Sudaj Ŝtatoj. Teksaso ekzistis de tempo al tempo sub la flagoj de kvin landoj: Francio, Hispanio, Meksiko, la

loĝas homoj, kiuj bezonas gvidanton. Miaopinie, multaj ĉi tie estus perditaj sen la vorto, kiun mi portas kaj donas al ili. Mi venis de kantono Logan, Kentukio, Usono. Tie la vivo estis pli facila, sed la homoj estis malpli bonaj, nebonkoraj. Ĉi tie la vivo estas tre malfacila, sed la homoj plejparte estas tre bonkoraj kaj laboremaj. Estas plezuro lukti kontraŭ la viv-obstakloj por kunveni kun tiom da bonaj, edukitaj homoj, kiuj multe celas bonon.

Ĉu vi scias, kiel multaj lertaj setlintoj venis al Teksaso? Estas vojsigno, kiu montras la vojon al Teksaso de orienta Usono, kun skribaĵo: “Ĉi tiu vojo al Teksaso”. Homoj kun legopovo legis la signon kaj sekvis la vojon al Teksaso. Analfabetoj iris al aliaj ŝtatoj.

– *Kion vi faras ĉi tie? Kio estas via profesio?*

– Mi estas vojaĝanta pastro, itinera predikisto por la Metodista Episkopa Eklezio. En Teksaso ne ekzistas multaj grandaj urboj, kun grandaj preĝejoj, krom tiuj en Aŭstino kaj kelkaj aliaj urboj. La teksasanoj plejparte loĝas en la kamparo, tro for de la urboj, tro for de grandaj preĝejoj. Mi devas vojaĝi al ili surĉevalo. Mi vizitas ĉiun homon en mia regiono kiel eble plej ofte.

Ĉiutage mi vekigās en ies hejmo, preĝas al Dio, studas la Sanktan Bibliion ĉe kandeloj, matenmanĝas kun la gastigantoj, legas miajn

notojn pri la loĝantoj kaj baldaŭ aŭskultantaro, vokas la homojn veni al la diservo, kaj fine komencas la diservon. Ĉiutage la diservo komenciĝas je la kvina matene en la vilaĝo aŭ setlejo, kiun mi vizitas. Mi prelegas tiel frue, por ke ili povu komenci la laboron en la kampoj kiam la sunlumo permesas. En vintro la diservoj komenciĝas je la sesa.

Post la diservo, mi babilas kun geamikoj pri religiaj temoj kaj foriras surĉevalo al alia setlejo. Mia rondiro estas itinero 450 mejlojn longa. La rondiro enhavas 25 societojn, kiuj estas kongregacioj. La ĉirkaŭiro postulas 28 tagojn. Ĉiutage mi estras diservon ie. Unu preĝejo estas apud mia propra domo. Du vojoj inter la societoj estas du tagojn longaj... Mi restas en mia domo nur du el tiuj 28 tagoj. Ofte la plano ŝanĝiĝas. Novaj setlintoj alvenas. Aliaj mortas.

– *Kiel okazis, ke vi elektis tiun ĉi profesion?*

– En mia koro mi ricevis la vokon de Dio por servi. Mi tute ne estis preta por ĉi tiu laboro, sed simple mi eksciis, ke mi faru ĝin. Mi havis 17 jarojn, kiam mi ĉestis grandan kampkunvenon en Kentukio. En tiu semajnlonga kunveno mi aŭskultis multajn predikojn pri Dio. Unu pastro tie petis min, ke mi rajdu kun li al liaj rondiraj societoj. Mia patro permesis, kaj jen mi subite trovis min predikanta al aŭskultantaro pri miaj spertoj en la eklezio. Mia laboro do komenciĝis tiel subite, sen ia ajn trenajdo. Mi lernis dum mi laboris kaj legis el la Biblio.

– *Kiel vi lernis legi?*


– Kiam mi pastrigis, mi ne havis kleron. Mia lernejo ne estis bona. Mi fakte estis analfabeta. Bonkoraj homoj en la societoj instruis min legi. Mia unua libro, kompreneble, estis la Sankta Biblio. Nun mi tre subtenas la lernejojn kaj universitatojn, kiujn la Metodista Eklezio kreis kaj kreas. Mi legas multe, ĉefe surĉevalo en la bona vetero.

– *Kiuj estas viaj taskoj – kion vi faras ĉiutage?*

– Mia laboro sekvas la instruadon de la Biblio kaj de la libro *La DisCIPLINO de la Metodista Episkopa Eklezio*. Mi studas surĉevalo la Bibliion kvin horojn tage, se la vetero permesas. Mi ankaŭ legas ĉe kandelo antaŭ enlitiĝo kaj post ellitiĝo ĉiutage. La *DisCIPLINO* listigas miajn devojn, kiuj estas: prediki; kunveni kun la societoj kaj klasoj; viziti la malsanulojn, ĉiam labori, neniam malŝpari la tempon; seriozi; bonkondukti kun virinoj; kredi nenian malbonon pri homoj, sed pensi optimisme; ne esprimi publike malbonon pri homoj, sed korekti ilin pri la konduto laŭ bezono; ne honti krom pro pektoj; esti akurata; prizorgi la vidvinojn kaj orfojn, kaj servi aliajn. Mi gvidas geedziĝojn, baptojn, la Vespermanĝon de la Eternulo. Tamen, la ĉefa tasko estas savi animojn por la eterna vivo en la Ĉielo post la morto.

Kiam mi alvenas al nova setlejo, mi unue demandas: “Kiel vi fartas?” Post tio, mi demandas: “Kiel fartas via animo?”

Estas vojsigno, kiu montras la vojon al Teksaso de orienta Usono, kun skribaĵo: “Ĉi tiu vojo al Teksaso”. Tiuj kun legopovo legis la signon kaj sekvis la vojon al Teksaso. Analfabetoj iris al aliaj ŝtatoj.



Apud "sia" preĝejo

– Ĉu estas foje konfliktoj kun aliaj eklezioj?

– Neofte, ĉar preskaŭ ĉiuj en Teksaso estas metodistoj.

– *Kia estas la vivo en Teksaso?*

– La vivo tre malfacilas, sed ne tiel, kiel por la unuaj setlintaj blankuloj. Kiam ili venis de la orienta Usono antaŭ 30 jaroj, ne ekzistis vendejoj kun la bezonataj provizoj. Estis nur terura vetero, sovaĝaj indianoj, manko de manĝaĵoj, manko de akvo, manko de homaj rajtoj, nenia religia libereco, terura malsaneco, kaj ofte, malespero. Nun ni ankoraŭ havas problemojn, sed ne tiel kiel antaŭe. Ni funkcias sufiĉe por subteni la vivon.

Pardonu, se mi gratulas min mem, sed miaj grandaj kunvenoj por mia tuta kolekto de societoj donas apartan eblon por la homoj lerni unu de la alia. Tio estas granda socia evento, kiun la viroj kaj virinoj ĝuas. De miaj eventoj, la kamparanoj lernas kiel pli bone fari la taskojn, kiel ĉirkaŭiri la obstaklojn ktp. La diservoj kaj aliaj kunvenoj de la preĝejoj estas la koro de la vivo ĉi tie.

– *Kion teksasanoj furas ĝenerale? Kion ili faras en la libertempo (ĉu ili entute havas ĝin)?*

– La viroj plejparte laboras en la kampo, dum la virinoj prizorgas la enhejmajn aferojn. Ne ekzistas libertempo por bonaj homoj. Certe, estas kelkaj homoj, kiuj pasigas horojn en la drinkejoj. Mi ĉiam klopodas korekti iliajn vivmanierojn.

– *Kia estas la vetero en Teksaso?*

– Tio estas la demando por Teksaso. Ŝajnas ke la klimato nun estas pli milda ol en la pasinteco. Nun la someroj estas tre varmegaj, ofte sen pluvo, kaj la vintroj ne havas tiom da frosto. Antaŭ dek jaroj neĝis multe kaj ofte, kaj glacio aperis sur la riveroj por semajnoj. Mi ofte transiris riverojn kun mia ĉevalo sur la glacio. Mi ne plu povas fari tion pro manko de glacio.

Pro la pli bona vetero la agroj estas pli produktemaj. Ni lernis uzi la akvon de la riveroj, kaj kelkaj bienoj eĉ havas akvoputojn. Ni ne plu perdas homojn pro la malvarmego en la vintro, kiel en la pasintaj jaroj.

– *Vi portas tiel pezajn kaj varmajn vestaĵojn. Ĉu ne estas pli agrable porti pli malvarmajn vestaĵojn?*

– Mi tute ne havas monon por aĉeti taŭgajn vestaĵojn. Ĉi tiuj estis kudritaj antaŭ kelkaj jaroj, mane, fare de membro de societo, kiun

mi servas. Ĉion, kion mi havas, mi ricevis de la preĝejoj kiel donacon, eĉ mian ĉevalon. La mono, kiun mi ricevas kiel pagon, ne sufiĉas por subteni la vivon. Sen la bonkoreco de miaj geamikoj mi pereus.

– *Ĉu vi havas (aŭ volas havi) edzinon?*

– Mi ne havas edzinon, sed rajtas havi. La vero estas, ke mia vivmaniero estas nenia bona vivo por la virino. Mi ne deziras meti virinon en tiel malfacilan vivon. Alia punkto estas, ke mi devus peti la permeson de la gravuloj en la eklezia organizaĵo. Estas multaj virinoj en la societoj, kiujn mi vizitas, kiuj donas manĝaĵojn al mi. Edzinon? Ne. Virinoj estas tro gravaj por vivi en mia nekredibla vivo.

– *Kiom aĝa vi estas? Kiom longe homoj vivas en Teksaso?*

– Mi havas 65 jarojn. Mi faras ĉi tiun laboron jam dum 48 jaroj. Tio mem estas granda sukceso. Kutime vojaĝanta pastro vivas nur 10 jarojn en ĉi tiu profesio.

Kial pastroj mortas tiom ofte? La grandaj problemoj estas la ŝtormoj, inundoj, rabistoj, akcidentoj, sovaĝaj bestoj, fajroj, indianoj, ĥolero, tifoida febro, malario kaj multaj aliaj malsanoj.

– *Ĉu vi ne timas rajdi sola tiom longe? Ĉu neniu atakis vin? Kia estas via rilato kun indianoj?*

– La ĉiutaga vojaĝo estas la plej granda problemo, kiun mi havas. Kiam la rajdo estas nelonga, la vetero bela, kaj la vojo neabrupta, la vojaĝo estas agrabla. Sed... la indianoj. Ve! Jes, ili atakis min, sed ŝajnas ke ili deziris nur la ĉevalon. Jes, ili ŝtelis mian ĉevalon Kapitano. Kio okazis? Nu, lasu min klarigi. Kapitano, mia bona, forta, sed tre aĝa ĉevalo estas nekutima ĉevalo. Kapitano konas la vojon, kiun mi sekvas dum la monato. Mi kutime vizitas ĉiun hejmon, kiun mi vidas. Mi gvidis la ĉevalon laŭ la vojo al ĉiu domo, kaj ĝi bone scias tion. Kiam la indianoj ŝtelis Kapitanon, la ĉevalo kondukis siamaniere. Ĝi ne forgalopis laŭ la ordono de la indiano. Ĝi promenis malrapide. Ĝi turniĝis laŭ mia kutima vojo por viziti ĉiun domon! La indiano tute ne regis ĝin! Li forlasis ĝin kiel netaŭgan, kaj ekde tiam mi neniam plu ricevis ĝenon de la indianoj.

Krome, mi lernas multe pri la indianaj aferoj. Malgraŭ la fakto ke mi amas pacon kaj malamas militon, mi portas armilojn. Mi havas du pafilojn kaj multajn tranĉilojn por gardi min kontraŭ la indianoj, la rabistoj kaj sovaĝaj bestoj.

– *Ĉu ĉiuj, kiujn vi vizitas, ĝojas pri via vizito?*

– Tute ne. Ne ĉiuj ĝojas pri mia vizito. Sed tio estas mia laboro, por helpi ilin. Foje dum ekstera diservo mi predikis al granda grupo, eble pli ol ducent homoj. Mi prelegis pri la pardono, kiu estas havebla por ĉiuj, senrigarde al tio, kion oni faris. Mi rimarkis viron en la ombro de arbo, kvazaŭ li kaŝus sin. Mi rigardis lin rekte, kaj pli forte eldiris la vorton, kiun mi predikis.

Iom post iom li eliris el la ombro, kaj mi rekonis lin. Li estis tre konata ŝtelisto! Mi supozis, ke ĉiuj tie dezirus trovi lin por puni. Sed, finfine, li promenis antaŭen kaj staris rekte antaŭ mi. Li ploregis kaj apenaŭ povis paroli. Li konfesis ĉion, kion li faris, kaj petis pardonon. Li diris, ke li ja estas la ŝtelisto en tiu viligo.

Tiam li subite rememoris, ke mi estis inter tiuj, kiujn li rabis. Timego kovris lian vizaĝon.

Li malrapide turniĝis kaj alfrontis la aŭskultantaron. Li tremis timege pro la atendita atako de la viktimoj. Tamen – kio okazis? Ili venis al li kun ĝojo, ke li konfesis. Ili akceptis lin manpreme kaj brakume, plorante. Tio estis, eble, la plej granda momento en mia vivo de servado kiel vojaĝanta Metodista pastro. Amiko donis al li laboron. Li ankoraŭ laboras, dankeme kaj preskaŭ senĉese en la agroj por pagi la ŝuldojn.

Neniam dubu la povon de amikeco kaj pardono.

Post kelkaj tagoj mi vizitis maljunan virinon. Ŝi estis tiom malsana, ke ŝi apenaŭ povis manĝi – ŝi aspektis tre proksima al la morto... Mi klarigis al ŝi la historion pri la ŝtelisto, kiu konfesis kaj renkontis amon de la loĝantoj. Ŝi respondis, "Jes, mi scias. Mi preĝis por li dum multaj jaroj".

Al via demando mia respondo estas "ne". Ne ĉiuj ĝojas pri mia vizito. Sed tio estas mia laboro, por helpi ilin.


– *Ĉu vi vizitas ankaŭ la domojn de nigruloj?*

– Ŝŝŝŝ!!!! Tio estas malpermesita en ĉi tiu etoso de la Sudo! Mi devas klarigi. Milito venas. Ekzistas forta sento ĉi tie, nun, en ĉiu vendejo, ĉiu strato, ĉiu domo, – pri sklaveco. Multaj viroj posedas gesklavojn. Oni murdis kelkajn pastrojn, ĉar ili predikis al la nigraj sklavoj.

Kion mi faru? Mi klare faras mian laboron. Laŭ la opinio de multaj homoj, la sklavoj ne rajtas ĉeesti la diservojn, kiujn mi gvidas en la preĝejoj kaj hejmoj. Tial mi sekrete iras al la hejmoj de la sklavoj mem kaj servas ilin tie, kie ili estas. Mi donas al ili la vorton el la Biblio pri Dio... sed vi bonvole ne diru tion al viaj amikoj! Mi neniam scias, kiuj venus por murdi min en la mezo de la nokto pro mia servado al la nigruloj. Tio estu sekreto.

Intervjuis Ĵenja AMIS

Frato D. en la "nuntempa vivo" estas Filipino Dorcas, prezidanto de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko. Filipino estas inĝeniero, programisto, kapitano en la usona aerarmeo en 1969-1974, kiu flugigis la aviadilon C-130 "Hercules" tra pli ol 80 landoj, plejparte por savi homojn de tertremoj, inundoj, vulkanoj kaj aliaj katastrofoj, li ankaŭ estas patro de du filinoj.



Kiel vi fartas en alia lando?

Kiel konate, esperantistoj estas pli vojaĝemaj – kaj translokiĝemaj – ol neesperantistoj. Tre ofte la kialo estas internacia rilato kaj deziro esti kun amata persono el alia – foje tre malproksima – lando. La projekto Interkulturo (www.interkulturo.net) preparis demandaron pri adaptiĝo al nova kulturo en alia lando.

“Mi ne kutimas al fromaĝo ĉiam – kiel entreo, kiel ĉefa plado kaj ankoraŭ kiel deserto”

Valentina SIDOROVA (el Rusio / en Francion)

Valentina migris en Francion pro la edziniĝo. Ŝi atendis iomajn interkulturajn problemojn, sed “ĉiam aperas io neatendita, kaj tiel estas eĉ pli interese malkovri ion novan kaj poste jam pensi, ĉu akcepti aŭ rifuzi ĝin”, – ŝi diras.



– Estas problemoj pri manĝaĵoj: ekzemple, la francoj matenmanĝas dolĉe (dolĉaj bulkoj kun konfitaĵo, ĉokolado k.s.) – mi kutimis de la infanaĝo matenmanĝi, mi diru, sale: ovoj, butero, kolbasoj (kvankam nuntempe mi estas vegetarano). Laŭ mi, konfitaĵo konvenas al teo vespere. Mi ne kutimas ankau al fromaĝo ĉiam – kiel entreo*, kiel ĉefplado kaj ankoraŭ kiel deserto. Tio vere surprizis min. Kaj kvankam al mi plaĉas fromaĝo nun, tamen mi ne plu eltenas ĝin krom kiel matenmanĝon, kun pano kaj butero. Aparta ŝoko estas pri vino – ĝi certe estas bongusta, sed oni ne devas trinki ĝin kiel sukono aŭ akvon dum manĝado.

Alia afero – telefoni post la naŭa vespere estas konsiderata malbona kutimo. Nu, tio ne estas por mi. Se mi scias, ke homo ne dormas tutegale kaj spektas televidon ĝis la noktomezo – kial estas malpermesite telefoni?

Ĉu ŝanĝiĝis mia vivmaniero? En la komenco mi provis al ĉio adaptiĝi, sed post iom da tempo mi komprenis, ke tio ne eblas, kaj se mi daŭre perfortos min, mi jam povos adiaŭi la landon. Kaj mi forlasis la provojn vekigi je la sepa, akompani manĝadon per fromaĝo kaj vino, diri al ĉiuj, ke ĉio enordas kun granda rideto sur la vizaĝo, kiam ne ĉio vere iras glate. Kaj tiel pli facilas vivi. Iusence, oni ŝanĝas vivmanieron kiam oni komencas vivi kune, kaj tio, laŭ mi, ne dependas de migro. Homoj devas adaptiĝi unu al la alia en limigita spaco. Certe ili devas ŝanĝi la vivmanieron kaj ĉiam pensi pri la alia, se oni vere volas esti kune.

“Foje homoj traktas min stulta nur ĉar mi ne sukcesas diri ĉion en la loka lingvo”

Sonja PETROVIĈ-LUNDBERG (Serbio/Svedio)

Ankaŭ Sonja translokiĝis (en Svedion) pro la sama kialo – ŝia edzo estas svedo, sed antaŭe li sufiĉe longan tempon loĝis en ŝia devenlando – Serbio.

– Mi atendis problemojn: lingvajn barojn, mankon de proksimaj geamikoj, malfacilaĵojn havi etan infanon en nova kulturo, kiu estas ne tiom helpema kiel tiu, de kiu mi devenas. Foje homoj traktas min stulta nur ĉar mi ne sukcesas diri ĉion en la loka lingvo. Mi ankaŭ sentas min tre malfacila pri kutimoj en ĉiutagaj okazaĵoj, kiel, ekzemple, vizitoj kaj festoj. Sed kulturiferencoj estas malpli severaj ol mi atendis antaŭe: la ŝanĝoj estis kaŭzataj ĉefe pro la kreskanta infano, nova laborritmo kaj alia financa situacio, apenaŭ de nova kulturo.

“Tie oni multege tuŝas kaj eĉ brakumas aŭ kisas fremdulojn”

Heming WELDE THORBJØRNSEN (Norvegio/Skotlando)

Same Heming migris al alia lando ĉar lia amato loĝis tie. Heming supozis, ke estos malgrandaj problemoj, sed li ne pripensis, kiaj specife.

– Eble tio ne estas veraj problemoj, nur kelkaj defioj. Ekzemple, en mia kulturo ne estas ĝentile tuŝi unu la alian, sed en Skotlando oni multege tuŝas kaj eĉ brakumas aŭ kisas fremdulojn. Tion mi ne ŝatis kaj neniam alkiutimiĝis. Krome, laŭ mia kultura fono, Skotlando estas malpura lando: ekzemple, oni eniras la domon sen forpreni la ŝuojn – ĉe ni tio estus grava rompo de gastigemo. Ĉu mi ŝanĝis la vivmanieron? Jes, mi alkiutimiĝis al la skota difino de pureco kaj ŝanĝis mian reagemanieron al tiaj aferoj. Mi ankaŭ ŝanĝis miajn manĝkutimojn – mi manĝis multege da tipe skotaj manĝaĵoj kaj ne sopiris al la norvegaj.

“La plej granda ŝanĝo por mi estis ne migro de Usono en Eŭropon, sed translokiĝo de malgranda urbo en grandan urbon”

Chuck SMITH, Usono/Nederlando

Chuck translokiĝis en Nederlando por sperti alian kulturon kaj lerni alian lingvon. Kulturaj



problemoj estis, sed ne tiel grandaj, kiel li atendis – ekzemple, malsamaj manĝaĵoj en la vendejoj.

– La neceso lerni la nederlandan ne estis tiom granda obstaklo, ĉar preskaŭ ĉiuj en Nederlando povas paroli la anglan. Fakte la plej granda ŝanĝo por mi, verŝajne, estis ne migro de Usono en Eŭropon, sed translokiĝo de malgranda urbo en grandan urbon. Tiel mi vere ekŝatis la urban vivon kaj decidis poste translokiĝi en Novjorkon. Kelkaj usonanoj en Novjorko diras, ke translokiĝi en Novjorkon estas kvazaŭ ekloĝi en alia lando. Mi aŭdis la samon de britoj pri Londono kaj de rusoj pri Moskvo...

“Se oni iras kun tiuj stereotipoj en la kapo serĉante – ĉiam eblas trovi homojn, kiuj agas tiel”

David-Emil WICKSTRÖM

David-Emil translokiĝis multfoje: el Norvegio en Aŭstrion kaj poste Germanion (pro la



laboro de la patro), reen en Norvegon pro la studoj, denove en Germanion, en Rusion, parte pro la koramikino (“pli facilas por okcidenteŭropanoj ricevi vizon al Rusio ol inverse”) – krome, li ĉiam interesiĝis pri Rusio. Li atendis kaj ja spertis kulturajn malfacilaĵojn.

– Ĉu la kulturaj diferencoj estas la samaj, kiujn mi atendis? Nu, dependas – ekzistas stereotipoj pri landoj, kaj se oni iras kun tiuj stereotipoj en la kapo serĉante – ĉiam eblas trovi homojn, kiuj agas tiel. Aliflanke, la vivo en diversaj lokoj ĉiam varias depende de la urbo, infrastrukturo, salajroj, lokaj geamikoj k.s. Kaj pro tio oni ĉiam malkovras ion malsaman de tio, al kio vi alkiutimiĝis, ĉu atendante aŭ ne. Ekzemple, en Eŭropo estas stereotipo, ke rusaj viroj drinkegas. Iuj ja faras tion, sed iuj tute ne.


Mi ĉiam adaptiĝis en miaj vivmanieroj post translokiĝoj, sed tio okazas ankaŭ post konatiĝoj kun aliaj – homoj kolektas spertojn kumule (almenaŭ laŭ mia filozofio) kaj pro tio ĉiam ŝanĝas aspektojn en la vivo.

“Fritita kokajo en Georgio estas de tri specoj: kun multe da graso, kun vere multe da graso kaj boligita en graso”

Ĵenja AMIS, Ukrainio/Usono

Ĵenja venas el Ukrainio kaj loĝas en Usono (Georgio, Atlanto) jam preskaŭ jaron. Ŝi apenaŭ spertis malfacilaĵojn adaptiĝi – eble pro tio, ke ekde komenco lingva problemoj apenaŭ ekzistis por ŝi kaj la loka kulturo estas tre amikema.





– En Ukrainio oni konsideras usonanojn amikemaj kaj ridetemaj – kaj tio ja veras! Aparte tio veras rilate la sudanojn – georgianojn ofte salutas nekonatojn sur la stratoj – eĉ en la granda urbo kiel Atlanto – multe ridetas, ofte alparolas al la nekonatoj; se vi estas eksterlandano, ili nepre demandas vin, ĉu plaĉas al vi Georgio, Atlanto ktp. Foje en la metrostacio venis al ni policisto kaj demandis, ĉu ni ne bezonas helpon ion trovi – kvankam ankaŭ ukrainoj estas amikemaj, policistoj neniam demandas ĉu iu bezonas helpon...

Ankaŭ la sudaj manĝaĵoj estas bongustaj! La suda usona kuirarto iom similas al ukraina: en ambaŭ Ukrainio kaj Georgio oni ŝatas kuiri kun multe da graso (kvankam nun, kom-

preneble, la tendenco estas uzi malpli da graso en ambaŭ lokoj). Oni eĉ ŝerce diras, ke fritita kokaĵo en Georgio estas de tri specoj: kun multe da graso, kun vere multe da graso kaj boligita en graso.

Alia oftega suda afero estas glaciteo – tradicio trinki teon venas ankoraŭ de la tempoj kiam la lando estis brita kolonio, sed ĉar Georgio en somero estas neelteneble varmega, oni modifis ĝin por la lokaj kondiĉoj, kaj nun se vi petos “teon” ie ajn en la sudo vi ricevos ne varman teon, sed glaciteon. Se vi manĝas en restoracio kaj mendas glaciteon vi plene rajtas ricevi la duan glason da teo senpage. Nuntempe glaciteo troveblas tamen principe ĉie en Usono – sed alia esenca aspekto de la vera suda varianto estas dolĉeco. Kaj la gradoj de dolĉeco, oni diras, pliĝas ju pli suden oni iras (tiu ĉi regulo validas pli-malpli ĝis oni atingas Floridon – tiam la tendenco inversiĝas kaj kiam oni atingas la sudan pinton de Florido [Miami, ekz.] oni jam ne plu estas en suda kulturzono)! Ĝi estas tiel populara (multe pli populara ol atlant-devena kokakola), ke oni eĉ volis laŭleĝe devigi ĉiujn restoraciojn ĉiam havi dolĉan glaciteon, kiun oni cetere nomas la tabla vino de la Sudo.

“Ĉiam kiam mi promenis surstrate mi renkontis ŝajne ĉiajn reagojn ekde ĝojaj krioj de infanoj kaj gimnazianoj ĝis ŝok/mirplenaj mienoj de maljunuloj”

Joel AMIS, Usono

Kvankam Joel nun loĝas denove en la loko kie li naskiĝis (Atlanto, Georgio, Usono) li kelkfoje loĝis eksterlande.

– Mia unua, kaj certe plej frape malsimila al mia denaska loĝloko, eksterlanda loĝloko estis Japanio. Mi partoprenis en interŝanĝoprogramo

kaj instruis la anglan en kampara japana lernejo – la grava celo de tiu programo estas “internaciigi” kulture izolitan kamparan Japanion.


Mia lernejo estis en kampara urbeto ĉe la marbordo de la Japana Maro. Mi estis tie unu el la solaj du “okcidentanoj” en la tuta urbeto – tiu fakto per si mem starigis kondiĉojn por interkulturaj spertoj ĉiutage. Ĉiam kiam mi promenis surstrate mi renkontis ŝajne ĉiajn reagojn ekde ĝojaj krioj de infanoj kaj gimnazianoj ĝis ŝok/mirplenaj mienoj de maljunuloj, kvazaŭ ili estus vidintaj estaĵon de planedo ne malpli proksima ol Marso. Aliaj interesaj reagoj rilatis al mia fizika aspekto (kutima, neniel speciala blankula miksaĵo, tiel kutima en Usono) – kun granda fascino miaj 11-15-jaraĝaj lernantoj admiris kaj eĉ deziris tuŝi mian ondecan hararon!

Adaptiĝo al la fizika ĉirkaŭaĵo estis komence ne tiel malfacila – mi alvenis en somero, kaj la klimato tie estas sufiĉe simila al tiu en Atlanto. Nur en vintro mi alfrontis grandan ŝokon: japanaj domoj ĝenerale ne havas centran hejtadon! Oni ja povus imagi tion en iu tropika insulo – sed tiu parto de Japanio ricevas pli ol metron de neĝo ĉiuvintre! Oni hejtas la domon per moveblaj kerosenaj hejtiloj, kiuj ja iel hejtas, sed tute ne kontentige (oni ne povas funkciigi ilin dum oni dormas ĉar estas risiko de sufokiĝo)... Estis sufiĉe konsternante vekiĝi matene kaj vidi la propran spiron!

* entreo – plado dum eŭropeca mango, antaŭmetata post la supo aŭ la antaŭmanĝaĵoj, eventuale post fiŝaĵo, kaj antaŭ la ĉefplado.

Preparis Katja IGNATJEVA, Rusio/Svedio

Ĉarma rakonto pri la vivo en vikinga vilaĝo



Ĵenja Amis,
Ukrainio/Usono

Arne, la ĉefido. Rakonto el la vikinga epoko. Leif NORDENSTORM. KAVA-PECH. Dobřichovice. 2005. 112 paĝoj. 5,40 eŭroj.

La libro *Arne, la ĉefido* estas libro por

8-12-jaraĝaj infanoj, kaj jam pro tiu ĉi fakto ĝi meritas la atenton – ja draste mankas en E-literaturo legaĵoj por infanoj en tiu aĝo (nu, entute mankas porinfanaj legaĵoj). Kiel sciigas al ni la subtitolo, ĝi estas la rakonto el la vikinga epoko. Ne, ĝi ne estas “sagao pri iama gloro”, nek estas ĝi “pirateca” rakonto pri la vikingaj invadoj. Ĝi estas ĉarma rakonto pri la ĉiutaga vivo en vikinga vilaĝo en la 9-a jarcento.

Ĝi estas fikcia rakonto kun historia elementoj: “Eble okazis io simila al la okazintaĵo en la libro. Vikingoj el Svedio kaj el ceteraj Nordiaj

landoj vojaĝis ekde ĉirkaŭ 800 p.k. kaj dum 250 jaroj poste al fremdaj landoj en vojaĝoj kiuj estis kombinaĵo de komercaj vojaĝoj, rabado kaj elmigrado”, – skribas la aŭtoro de la libro, Leif NORDENSTORM, en la postparolo. Tamen, aperas en la rakonto du historiaj personoj – kristanaj misiistoj, kiuj vojaĝis al tiam pagana Svedio. Ĝuste pro tio la aŭtoro “enloĝigis” la rolulojn ĝuste en la 9-an jarcenton – por montri, almenaŭ iomete, la transiron de la praskandinavia religio al kristanismo, kiu okazis malrapide dum pluraj generacioj.

La ĉefa heroo de la rakonto estas Arne, ĉ. 10-11-jaraĝa knabo. Li estas filo de la ĉefo de la vilaĝo kaj samtempe nepo de sklavo. Ilia familio posedas sklavojn, kaj grava elemento de la rakonto estas lia kompreno, ke ankaŭ sklavoj estas homoj kaj meritas bonan traktadon. Multon en tiu kompreno li ŝuldas al la venintaj misiistoj kaj la amikeca rilato kun unu el la sklavoj.

La tuta rakonto estas verkita tre realisme – la aŭtoro, evidente, mem interesiĝas kaj faris

esplorojn pri la vivo en la tiutempa Svedio. De la libro oni ekscias pri la ĝojoj kaj la zorgoj de la vilaĝanoj, pri la manĝoj, kutimoj kaj homaj rilatoj. Sed kio vere mankas en la rakonto estas intrigo – la rakonto estas iom monotona...

La stilo de la rakonto estas ĝenerale sufiĉe facila – kvankam ne tiel facila, kiel mi atendus por la 8-12-jaraĝaj infanoj... Foje troviĝas tie pezaj gramatikaj formoj, kaj nur manplenetado vortoj havas siajn klarigojn fine de la libro (kiel “runo”, “Odino”, “Saksio” ktp.) – tamen, en la teksto estas neniu indiko, ke fine de la libro haveblas klarigoj. Aperas tie ankaŭ multaj sufiĉe malfacilaj kaj klarigindaj vortoj (“boardi”, “sagao”, “medo”, “vadi” kaj multaj aliaj). Tamen mi devas ĝenerale laŭdi bonan stilon kaj provlegadon de la libro: ĝi estas preskaŭ senerara – sentebblas la redaktora sperto de la verkinto (Leif NORDENSTORM estis dum longa tempo redaktoro de *KONTAKTO* kaj de la sveda *La Espero*).

Tamen, eĉ malgraŭ tiuj ĉi mankoj, mi ja rekomendas tiun ĉi libron al ĉiuj, en kies familioj kreskas denaskaj E-parolantoj!

Rompante stereotipojn

Helpemaj kanadanoj, laboremaj germanoj, malfermitaj rusoj kaj amemaj italoj... Ĉu vere?!

Jenja AMIS, Ukrainio/Usono

Ni ĉiuj havas stereotipojn pri aliaj homoj – kaj ankaŭ pri niaj sam-landanoj. Sed ĉu ni vere konas ali-landanojn? Ĉu ni konas eĉ nin mem?.. La sciencaj studoj diras – nek tio, nek alia...

En la vasta studo, eta parto de kiu estis publikigita en la revuo *Science* (*Scienca*, oktobro 2005, www.sciencemag.org) partoprenis preskaŭ kvar mil homoj el 49 kulturoj, de ĉiuj lingvaj familioj. La sciencistoj petis unu grupon de homoj pri-skribi la tipan anon de ilia kulturo (ne nepre lando: ekzemple, franc-lingvaj svisoj kaj german-lingvaj svisoj estis en malsamaj grupoj). Alia grupo devis priskribi sin mem kaj konatajn homojn de lia/ŝia kulturo. Kiel bazon ili uzis kvin ecojn: 1) societemo (kiel facile oni rilatas kun aliaj homoj); 2) agrableco (kiel helpemaj kaj afablaj oni estas al la aliaj); 3) **konscienco (disciplinemo kaj ordo)**; 4) **nervozeco** (kiel ofte oni havas malbonajn sentojn, kiel maltrankvilo aŭ malgajo); kaj fine, 5) malfermeco. La ĉefa ideo estis kompari la rezultojn, kiujn oni ricevas de ambaŭ grupoj. Kiel vi jam povas supozi, la rezulto estis sufiĉe malsamaj!

La studo dis-batis multajn stereotipojn: ekzemple, ke usonanoj estas ordonemaj, dum kanadanoj estas obeemaj (ili ambaŭ estas pli-malpli samaj), aŭ ke ĉeĥoj estas malagrablaj (la rezulton montris la malon: ĉeĥoj estas multe pli afablaj kaj helpemaj ol **averaĝe**). Laŭ la studo, plej bone konas sin poloj kaj malplej bone konas sin britoj.

Alia interesa afero: stereotipoj, kiujn unu grupo havas pri la alia,

ofte estas *la samaj*, kiel oni havas pri si mem. Ekzemple, germanoj (rusoj, svedoj **ktp.**) pensas pri si simile al tio, kiel italoj, francoj, britoj **ktp.** pensas pri la germanoj (rusoj, svedoj **ktp.**). Sed se eĉ niaj propraj imagoj pri ni mem estas malĝustaj, tiom pli malĝustas tio, kion ni pensas pri aliaj homoj, ĉu ne? Unu el la aŭtoroj de la studo, usona sciencisto R.R. McCRAE, [mkrej] diras: “Oni kreas malsamecojn, kiuj ne ekzistas en la realo... Naciaj stereotipoj povas doni ioman informon ĝenerale pri la kulturo, sed ili ne povas priskribi unuopajn homojn”.

Jen nur kelkaj ekzemploj el la studo.

Plej societemaj konsideris sin portorikanoj, aŭstralianoj, hispanoj, nov-zelandoj kaj serboj. La lastaj iom eraris: laŭ tiu ĉi studo, serboj estas iomete malpli societemaj ol la “mezo”; ĉiuj ceteraj ja estas iomete (sed ne vere multe) pli societemaj. Malplej societemaj konsideris sin slovenoj, indonezianoj, franc-lingvaj svisoj, japanoj kaj estonoj. Slovenoj, indonezianoj kaj japanoj estis iagrade pravaj (kvankam slovenoj kaj japanoj estas preskaŭ en la mezo). Estonoj kaj franc-lingvaj svisoj, malsimile al siaj kredoj, estas pli societemaj ol **averaĝe**.

Evidentiĝis, ke ne multaj povas juste konsideri ankaŭ sian konscienceton. Ekzemple, svedoj, burkinanoj kaj estonoj konsideris sin tro konsciencaj. En la realo estonoj estas ĝuste en la mezo, dum svedoj kaj burkinanoj estas eĉ iomete malpli konsciencaj ol **averaĝe**. Male, hispanoj, turkoj, kroatoj kaj ĉilianoj entute ne konsideris sin konsciencaj. La studoj montras, ke nur indonezianoj estas iomete malpli konsciencaj ol **averaĝe**.



aĝe, ĉiuj ceteraj estas iomete pli konsciencaj. Same pri nervozeco: niĝerianoj konsideris sin nervozaj (kio ja ne veras), dum burkinanoj – malnervozaj (denove ne veras). Kanadanoj, nov-zelandoj kaj aŭstralianoj prave konsideris sin malnervozaj – tamen, ili estas ne ege malpli nervozaj ol **averaĝe**.

Kio pri malfermeco? Plej malfermitaj konsideris sin rusoj, hindoj, niĝerianoj, kuvajtanoj kaj portorikanoj. La realo montras, ke *neniu* el ili estas pli malferma ol **averaĝe**! Plej fermitaj konsideris sin ĉinoj, estonoj, ĉilianoj, turkoj kaj japanoj – en la realo nur estonoj kaj turkoj estas iom pli fermitaj ol **averaĝe**; ĉinoj, ĉilianoj kaj japanoj estas pli malfermitaj ol la “mezo”.

Bona demando estas, kial aperas tiaj stereotipoj? Kaj ĉu ni vere estas tiel limigitaj de ili, ke ni eĉ ne povas ĝuste taksi nin mem?.. La sciencistoj supozas, ke la naciaj stereotipoj aperas sur-baze de historiaj spertoj, literaturo, sociaj valoroj, politiko **ktp.** Kia ajn estas la origino, stereotipoj fariĝas kultura ero, kaj estas trans-donataj per la komunikiloj, eduko, oni-

diroj kaj ofte ŝercoj. Eĉ se multaj aferoj ŝanĝiĝas, stereotipoj ofte restas.

Diversaj grupoj povas uzi eĉ negativajn stereotipojn por **diskriminacii** aliajn homojn. La historio, bedaŭrinde, plenas je la ekzemploj de tio – sed ankaŭ nun stereotipoj povas esti danĝeraj. S-ro McCRAE diris: “Kiam ajn ni ekhavas tiujn ĉi stereotipojn, ni ne plu estas objektivaj por taksi niajn spertojn. Ekzemple, se ni renkontas iun tre ordoneman kanadanon ni pensas: ‘Nu, li estas escepto’, kaj simple ne konsideras la informojn, kiuj estas malsamaj de nia stereotipo”.

La unua paŝo seniĝi je stereotipoj estas kompreni, ke ili ekzistas kaj tre ofte estas malĝustaj. Tio ĉi ne estas nova ideo, simple ni devas pli ofte rememorigi al ni pri tio.

averaĝa – meza
disciplino – deviga regularo
diskriminacii – oficiale aŭ efektive forpreni iujn rajtojn de certa(j) hom-grupo(j)
konsciencia – obeanta al sia devo, tre zorgema
ktp. – kaj tiel plu
nervozaj – maltrankviligema
stereotipo – antaŭ-juĝo

Ĉu ni devas ŝanĝiĝi?

Simayre NNEER, Hispanio

Ankoraŭ nun la islama mondo estas ekscitita pro la karikaturoj publikigitaj de la dana ĵurnalo *Jyllands-Posten*, en kiu aperis la bildo de profeto Mahometo, kies kapo estis kovrita de bomboforma turbano. Tio kaŭzis veran revolucion inter ĉiuj islamanoj tra la

mondo; ili eliris al la stratoj por protesti, plendi kaj ataki okcidentajn entreprenojn en preskaŭ ĉiuj islamaj landoj. Tie oni ankaŭ bruligis flagojn de Danio kaj pluraj aliaj okcidentaj landoj, inkluzive Hispanion. Ili kriis kontraŭ Eŭropo, Usono, Okcidentujo kaj kio ajn, kio memorigis al ili la “okcidentan satanon”. En

Indonezio ili preskaŭ detruis la danan ambasadejon, en Gazao (Palestino) la okcidentanoj devis eskapi. Ankaŭ en Libano kaj Turkio estis manifestacioj, ĉi-kaze iom pli mildaj. La ridinda afero estas ke similaj karikaturoj antaŭ nur ok monatoj aperis en egipta ĵurnalo, kaj neniu diris ion. Ja ĉi-kaze tio okazis en islama lando, Egiptio – nek pli nek malpli, la nuna lulilo de la saĝaj opinioj pri la islama religio kaj kie troviĝas la

plej granda islama universitato en la mondo: la Universitato de Al-Azhar. Ĉu vi aŭdis ion pri ĉi tiu afero? Mi tute ne.

Sed ĉi-foje oni verkis la karikaturojn en kristana, eŭropa lando – lando, kiu partoprenis en la (kontraŭleĝa aŭ ne) invado en Irakon, kaj por pli granda rido unu el ĝiaj ĵurnaloj aŭdacas ridindigi la profeton de la islamanoj! En kiu mondo ni vivas?! – povas pensi islamano. Ni

vivas en libera mondo, kie karikaturaj estas karikaturaj. Ni ankaŭ ridindigis Kriston, la Papon, kaj Dion mem, kaj nenio okazas. Nur la Eklezio – evidente! – kritikis tiajn karikaturojn, kaj ankaŭ iuj malmultaj ekstremaj katolikaj grupoj. Tamen, nia socio ankoraŭ ekzistas, niaj institucioj ankoraŭ funkcias kaj niaj civitanoj ankoraŭ libere (aŭ tiel libere kiel eblas) vivas. Tio estas ebla ĉar post longaj jarcentoj da luktado kontraŭ la grandaj povoj, ni eŭropanoj atingis la dividon inter la religio kaj la Ŝtato, kaj nun la Ŝtato regas la homojn, kaj la religio(j) regas la animojn. (Usono estas aparta kazo, ĉar kvankam formale ili disigis la religion de la Ŝtato, la religio ankoraŭ tre multe influas en la socia kaj politika vivo, nenio sama okazas en Eŭropo.)

Certe, foje la Ŝtato modifas aŭ ŝanĝas polemikajn leĝojn, kaj la Eklezio plendas. Sed kontraste al tio, kio okazas en la islamaj landoj, la Eklezio ne havas la povon haltigi aŭ denunci antaŭ la ordinara tribunalo tiujn ĉi ŝanĝojn. Ĝi povas manifestacii kaj opinii, sed ĝi neniam povas eksciti la nacion. Se ĝi tiel agus, la Ŝtato rajtos defendi sin, kiel ĝi jam faris en la 18-a kaj la 19-a jarcentoj. Tiel pensas ni eŭropanoj, sed niaj najbaroj, sude kaj oriente, ankoraŭ ne alvenis al ĉi tiu politika punkto. Ni devas tion respekti, sed tio ne signifas rezigni nian propran naturon. Se ili ĝenerale punas la esprimliberon, tio ne okazas en Eŭropo, kaj same kiel ni respektas iliajn kutimojn, ili devas respekti la niajn. Se ili ne povas tion kompreni, ni rajtas defendi nin. Mi ne volas diri tiel

parolante ke ni militu kontraŭ ili – tute ne, sed ni povas limigi la enmigradon, bone gardi niajn limojn aŭ severe kontroli tion, por kio ili uzas nian monhelpon.

Francio komencas tian vojon per modifo de la enmigra leĝo. Ĝi volas malfaciligi la kondiĉojn por eniri la landon kaj ricevi la civitancon. Ili volas ricevi nur taŭgajn kaj spertajn enmigrintojn, kiuj okupos postenojn en la nacia ekonomio kaj aldonos riĉecon al Francio kaj samtempe al si mem. Tute logike, neniu volas krimulojn aŭ parazitajn, kiuj renversas la atingitan socian kaj ekonomian disvolvigon. Se ni havas altan ekonominivelon, tio estas ĉar ni luktis por gajni ĝin, sed ĉi tio ne estas la plej grava afero. Almenaŭ por mi, la plej grava afero estas nia socinivelo.

Tie ĉi viroj kaj virinoj estas

egalaj antaŭ la leĝoj, ĉiuj ni rajtas esti liberaj kaj defendi niajn rajtojn kaj ideojn, ni rajtas esti religiemaj aŭ ne, ni rajtas kritiki Dion mem kaj neniu povas devigi nin fari male. Kaj super ĉio kuŝas la respekto, ni povas agi libere, sed samtempe ni estas respondecaj por ne vundi ies puntilemon. Do, mi povas esprimi, sed ne ataki senlime. Tie ĉi homoj ne estas ekzekutataj pro tio ke ili estas samseksemuloj aŭ pro adulto. Ni estas mastroj de niaj korpoj – io kion ili ankoraŭ ne povas kompreni.

Tamen, ili pravos pri unu afero: ni ne devas ofendi ilin. Sed ĉu vere estas ofendo publikigi karikaturojn pri Mahometo, kiam ili mem publikigas tiajn?.. Iu ne povas denunci ion, kion li mem faras, se li ne volas mem fali en sian artifikon.

“Liberecojn oni ja devas limigi”

Karaj,
Kun granda intereso mi legis la leteron de Arturo Jimenez CARRETERO kaj Joel AMIS en KONTAKTO 210, 2005:6. La temo estas la eventualaj limoj de esprimlibero, kaj evidentigas malsama sento pri tio en diversaj landoj: skize, en Nord-Ameriko kaj eks-socialismaj landoj de centra kaj orienta Eŭropo regas la sento, ke preferindas ne limigi esprimliberon, dum en okcidenta Eŭropo oni konsideras, ke indas leĝe starigi netrapaseblan linion. La du vidpunktoj havas siajn favorajn kaj malfavorajn flankojn, kaj neniu el ili estas senkiala, tamen mi aliĝas al la limiga tendaro.

Liberecojn oni ja devas limigi, ĉar en grupa vivado oni ne povas akcepti, ke ies libero entrudiĝu en la liberon de alia: en la plej ekstrema kazo, oni ne povas toleri ies liberon mortigi. Tamen ĉe kelkaj regas la sento, ke esprimado de opinioj ne mortigas, nek limigas liberecojn de aliaj; aŭ ke ilia limigo, se eventuale konvena en kelkaj okazoj, montriĝas finfine pli danĝera ol plena libereco, ĉar malfacilas trovi klaran netrapaseblan linion, trans kiu esprimo de iuj ideoj endanĝerigas kunvivadon.

Tamen, ekzistas ekstreme danĝeraj opinioj: tiuj, kiuj insultas kaj malestimigas plenajn homgrupojn, ekz., judojn, islamanojn, romanojn, nigrulojn, inojn aŭ geojn. Regula subtaks-

ado de tutaj komunumoj kreas la psikologiajn faktorojn permesantajn perforton: foje temas pri ĉiutaga perforto, ekz., kontraŭ inoj, sed foje la malamo fokusigas kontraŭ tutaj gentoj, kaj ekokazas amasmurdoj. Ekzemple, neniu diskutas la grandan respondecon de la flamiga radio “Mil montetoj” antaŭ la buĉado de unu miliono da tucoj en Ruando, kaj similajn okazojn da malam-semado oni priskribas antaŭ ĉiu milito.

En la lastaj kelketaj jaroj en Hispanio aperas pli kaj pli da artikoloj en difinitaj gazetoj kun ksenofobaj elementoj kontraŭ katalunoj. Diversaj ĵurnalistoj taksas normala armean puĉon, kaj kelkaj el la plej elstaraj membroj de la dekstra partio, facilanime paraleligante Hispanion al eksa Jugoslavio, nekaŝe komprenigas, ke hispana registaro povus agi tute simile al la serba de Miloŝeviĉ, se eŭskoj aŭ katalunoj proklamus sendependiĝon. Ĵusa statistiko montras, ke 10% de la hispanoj akceptus armean regadon, kaj, laŭ ĉiuj raportoj, la vivo de katalunoj loĝantaj en la nekatalunlingva parto de Hispanio fariĝis multe pli prema.

Mi kredas kaj fortege esperas, ke la situacio ne evoluos al sanga konflikto, sed ni alfrontas okazon, kie manko de limoj en esprimlibereco kaŭzas realan danĝeron kaj por difinita minoritato en lando kaj entute por demokratio. Mi sentus min pli sekura, se tiuj homoj endanĝerigantaj mian liberecon, mian sekurecon kaj eventuale eĉ mian vivon estus procesitaj

kaj eventuale senigitaj je sia libero. Inter du malbonoj prefere ni elektu la malplej malbonan.

Kore,
Hektor ALOS i FONT, Katalunio

“La defendado de esprimlibero ne signifas rezignadon de la persona libero”

Al la respondo de Joel AMIS rilate la reagon de Arturo Jimenez CARRETERO (KONTAKTO 210, 2005:6) pri la opinio de Vladimir SĈOTKIN (KONTAKTO 207, 2005:3).

Kara amiko,

Mi bedaŭras, ke vi loĝas en lando – Usono – kie la misfamigado, insultado, ofendado kaj humiligado [ne] estas denuncceblaj, kaj tiel oni ne limigas la esprimliberon. Tio okazas ĉar via lando estas demokratia lando – same kiel la mia – tamen, la opinioj kiel tiu de s-ro SĈOTKIN estas denunciataj, kaj en Hispanio kaj en Usono.

Vi defendas la esprimliberon, kaj ankaŭ mi. Sed tia defendado ne signifas rezignadon de la persona libero. Klare estas ke iu ajn povas pensi kaj paroli laŭvole, sed ankaŭ ĉi tiuj homoj devas konsideri, ke iliaj agoj/paroloj havas konsekvencojn. Kiam homo parolas, kaj lia/ŝia esprimo estas diskonigita al la aliaj homoj, ĉi tiuj vortoj kreas opinistaton, kaj la opinistatoj provokas agadojn. Kial do ĉiuj diktatoroj en la mondo

utiligis la paroladon kiel la ĉefan ilon por mobilizi siajn popolojn? Ĉar ili tre bone konis la efikon kaj efikecon de siaj vortoj. HITLERO, FRANKO, STALINO... ne gravas kiu el ili, ĉiuj uzis la vortojn por atingi siajn celojn. Ili sciis, ke se ili sukcesus flamigi la popolon per siaj vortoj, ili ne plu havus opozicion. Kiu opinias, ke diri ne estas fari?

HITLERO neniam mem mortigis judon, sed pere de siaj vortoj li kreis opinistaton, kiu tra la kreita etoso puŝis la germanojn mortigi judojn dum “La Nokto de la Longtranĉiloj” kaj poste dum la Dua Mondmilito. Li (HITLERO) neniam agis, sed li jes diris, kaj la aliaj agis laŭ liaj vortoj. La rezulto: la Holokaŭsto kaj la milito.

Sammaniere FRANKO kaj STALINO agis, kaj ĉiuj el ili tiel faris ĉar neniu aŭdacis denunci iliajn vortojn aŭ paroladojn. Iuj ne faris, ĉar ili opiniis, ke tio ne tuŝas ilin, aliaj – ĉar li/ŝi havis eraran opinion pri la esprimlibero, kaj ceteraj ĉar ili samopiniis.

Ofendo estas ofendo, kaj neniu devus ofendi iun. Vere estas, kiam oni parolas pri polemika temo, estas tre malfacile ne vundi ies puntilemon, sed vundi puntilemon ne estas ofendi. Vi, Joel, estas la plej evidenta ekzemplo pri tio. Ni du interŝanĝas opiniojn pri la temo, sed neniu insultas la alian. Kontraŭe, kiam iu diras pri homo, ke li/ŝi estas malsanulo, detruas la familion, malstrukturigas la socion kaj eldiras ceterajn “belaĵojn”, tiu homo ofendas kaj tre insultas. Tio ne vundas ies puntilemon, sed li konscie parolas kaj tute

konas la damaĝon, kiun li/ŝi kaŭzas.

La mondfama hispano – CERVANTES – diris: “Zorgu, gesinjoroj, pri tio, kion la homoj diras, ĉar ekde Adamo ĝis hodiaŭ la vortoj estadis tre nocaj. Pli da homoj mortigis la fontoplumo ol la glavo, kaj tion bone konis ĉiuj regantoj de la tempoj”.

Por fini ĉi tiun opinionon, mi citu J. JOYCE, kiu diris jenon: “Unue ili venis kapti la ciganojn. Ĉar mi ne estas cigano, mi ne maltrankviliĝis. Poste ili kaptis la samseksemulojn, sed ĉar mi ne estas samseksemulo, mi ne zorgis. Post tio ili venis kapti la judojn. Tial ke mi ne estas judo, mi ne zorgis. Finfine, ili venis por kapti min, sed jam estis tro malfrue por maltrankviliĝi”.

Ni ne devas forgesi ke ajnamente ni povus esti la viktimo, do ni devas lukti kontraŭ la opinioj, kiuj estas evidente kontraŭdemokratiaj kaj tiel agi sen malveraj kompleksoj. Tio ne estas kontraŭdemokratia sinteno, tio estas la plej demokratia el ĉiuj eblaj sintenoj.

Arturo Jimenez CARRETERO,
Hispanio
<e-officialmail@wanadoo.es>

“Kiu decidas, kio estas ofenda kaj kio ne?..”

Karaj legantoj,

Mi sentas ke mi devas doni kelkajn klarigojn kaj resumon pri la longa diskuto por tiuj, kiuj ne legis (aŭ ne bone memoras) la opinionon, kiu estigis ĝin. En *KONTAKTO* 207 (2005:3), en la rubriko “Opinie”, aperis polemika opinio “Ĉu ni rajtas fariĝi gejoj”. En tiu ĉi artikolo la aŭtoro – s-ro SĉOTKIN, Uzbekio, subtenas sufiĉe oftan en eks-Sovetunio biologian vidpunkton. Li opinias, ke samseksemo estas libera elekto, kaj ke oni “ne forgesu siajn naturajn inklinojn”. En la sama numero aperis kontraŭopinia respondo fare de la vicredaktoro de *KONTAKTO*, Joel AMIS, kun la titolo “Ni ne ĝenu homan feliĉon kaj spiritan kontentecon pro materiismaj biologiaj dogmoj!” Tie Joel defendis la rajtojn de gejoj kontraŭ antaŭjuĝoj de unuopaj homoj kaj la Eklezio, inkluzive, formi samseksajn familiojn, ĉar, laŭ lia opinio, por samseksemuloj ĝuste samseksaj rilatoj estas la natura inklinado, kaj ne libera elekto (legu pli pri la gejoj rajtoj en *KONTAKTO* 201, 2004:3, en la artikolo de Joel AMIS “Kion la Biblio vere diras pri samseksemeco”).

En *KONTAKTO* 210, 2005:6, aperis reago de s-ro CARRETERO pri la opinio de s-ro SĉOTKIN, en kiu li opiniis, ke la redakcio intence “mendis” tiun ĉi artikolon por respondi “al via deziro doni voĉon al ĉiuj” (kio, cetere, ne veras), kaj ke en lia lando – Hispanio – li povus denunci tian artikolon, kaj ke tiaj opinioj entute devas ne aperi en la gazetaro. En la sama numero Joel respondis, ke, malgraŭ lia ĉia kaj plena malkonsento kun la enhavo de la opinio de s-ro SĉOTKIN, li tamen defendas lian rajton esprimi sian opinionon en la opinia rubriko. Post tiu publikigaĵo al la redakcio alvenis du pliaj reagoj pri la temo (de s-ro SĉOTKIN mem kaj de alia persono, kiu subtenis lian opinionon), sed ni decidis fermi tiun ĉi temon jam en *KONTAKTO* 210 (2005:6) – tio neniel rilatas al la emo de la redakcio al nure unu flanko, simple se ni ne fermus tiun temon jam tiam, ni devus dediĉi multajn paĝojn de la revuo por publikigi nur reagojn al tiu ĉi polemikega temo. Pro tio ĉi ni pardonpetas al la verkintoj de la nepublikigitaj opinioj.

Sed kial do ni publikigas aliajn, ŝajne, ĉi-temajn opiniojn? Ĉar ili jam rilatas al la *alia* temo: esprimlibero. La temo de esprimlibero estas vastega, kaj en unu el la venontaj numeroj de *KONTAKTO* ni dediĉos al ĝi multe da atento. Ni faros enketadon kaj nepre kontaktos ĉiujn, kiuj reagis al tiu ĉi diskuto, por kolekti (kaj poste publikigi) iliajn opiniojn pri esprimlibero. Intertempe mi alvokas ĉiujn interesatojn esplori tiun ĉi temon – bonŝance, estas multe da bonaj legaĵoj en la interreto, revuoj kaj libroj. Ĉu ankaŭ vi volus partopreni en nia enketado kaj havas vian vidpunkton pri esprimlibero? Nepre skribu al la redakcio (bv. vidi la adreson en la kolofono, p. 2)! Ĉiuj viaj reagoj kaj opinioj estas tre atendataj kaj pli ol bonvenaj!

Kia estas nia redakcia politiko pri esprimlibero, cenzuro kaj politika korekteco? Ĉar ne ekzistas unusola kaj nekontestebla vero, la redakcio klopodas ĉiel esti neŭtrala, objektiva kaj doni la voĉon al ĉiuj flankoj. Ni ĉiam strebas (kaj strebos fari pli bone) esti fidelaj al la principoj de ĵurnalismo kaj analizi, kontroli la faktojn, nombrojn, nomojn, fontojn k.a., doni la redaktoraĵajn klarigojn kaj piednotojn en la kazoj, kiam ekzistas aliaj teorioj pri la afero, ktp. Tamen, la redakcianoj komprenas, ke iuj artikoloj, kiuj tuŝas

gravajn temojn, povas esti malkonsentaj, kaj la paĝoj de *KONTAKTO* ĉiam estas malfermitaj al ĉiuj reagoj de la legantoj, ĉu en la formo de “bumerango” (eta reago al artikolo) aŭ en la formo de alia artikolo.

Kio pri la rubriko “Opinie”? Ĝi estas speciala rubriko por opinioj, kiuj estas tro polemikaj por publikigi en aliaj rubrikoj de la revuo, aŭ ne neŭtralaj artikoloj, t.e. tiuj, kiuj reprezentas nur unu flankon (tamen tio neniel signifas ke ili estas “malbonaj” – ni ĉiuj rajtas havi nian propran opinionon, kiu ne ĉiam devas esti neŭtrala). Kaj la vorto “opinie” neniel sinonimas al alvokoj al kontraŭhomaj agoj – ili nek iam venis, nek, kompreneble, iam publikigis en nia revuo aŭ iu ajn alia serioza revuo.

Sen altrudi al la legantoj mian personan opinionon pri la afero (oni ja ne povas altrudi la veron, oni povas nur proponi ĝin, diris la forpasinta Papo Johano Paŭlo la Dua), mi tamen petas la permeson diri kelkajn miajn personajn konsideraĵojn pri la afero. Mi konsentas kun la opinioj de s-roj Arturo CARRETERO kaj Hektor ALOS i FONT, ke la vortoj ja havas grandan povon. Pro tio en ĉiuj totalismaj ŝtatoj diktatoroj ĉiel strebas subpremi la esprimliberon. Ekzemple, dum STALINO ekzistis nur unu opinio – “korekta”, konvena al la instruoj de la “Patro de la Popoloj”. Pro ĉiuj aliaj opinioj oni povis en la plej bona okazo sendi al Siberio, kaj en la plej malbona okazo – turmenti, konfesiĝi pri ĉiuj eblaj kaj neeblaj pekoj, mortigi kaj poste neniigi ĉiujn registrojn pri tiu homo, kvazaŭ li/ŝi neniam ekzistis. Dum tiu tempo la homoj en Sovetunio devis lerni “legi inter la linioj”, ĉar ĉiuj gazetoj estis tiel ege cenzurataj, ke neniu opinio, krom la “korekta”, povis eniri ilin.

Ni memoru la “grandan fajregon” en Germanio, kiam la cerbolavitaj homoj (pro la ŝtata propagando per ĉiuj amaskomunikiloj) bruligis la humanismajn verkojn de eminentaj germanaj verkistoj kaj poetoj. Kaj certe ni ne forgesu la pli lastatempajn eventojn, kiel amasmurdoj en Ruando... Sed ĉu vere la radia elsendo provokis la amasmurdon? La radio ja estis nur *ilo* en la manoj de la registaro, kiu misuzis ĝin. La kialoj estis multaj, kaj ili kaŝiĝas profunde en la historio kaj en la fiagoj de la diktatora registaro. La samo validas pri Germanio dum Hitlero, Sovetunio dum STALINO, Hispanio dum FRANKO – la listo, bedaŭrinde, estas senlima... La amaskomu-

nikiloj en totalismaj ŝtatoj neniel estas liberaj – ili estis nur iloj en la manoj de la grupo de fiuloj, kaj tiuj fiuloj uzas ilin por eksciti homojn kaj provoki murdojn.

Sed kiel do eblas eviti tiajn situaciojn? Ĉu vere kontroli la esprimliberon kaj cenzuri ĉion, kio povas esti ofenda por iu, gvidos al paco kaj trankvilo inter homoj? Mi opinias, ke ne. Kial? Ni rigardu, kiu decidas, kio estas ofenda kaj kio ne, kaj kiu starigas la normojn – ĉu la homoj aŭ la registaro? Bone, la homoj elektas la registaron, kaj la registaro povas decidi tion per sia demokratia burokrata sistemo de kortumoj ktp. Sed la registaroj emas ŝanĝiĝi kun ĉiu ŝanĝo de politika klimato. Se hodiaŭ oni elektis la registaron, kiu subtenas geajn rajtojn, civilajn kaj aliajn liberecojn, morgaŭ aliaj povas elekti la registaron, kiu subtenas la rajton je vivo (t.e. malpermesas abortigojn) kaj “la naturajn inklinojn” (t.e. agas kontraŭ gejoj). Kaj se ni donos al ili la rajton decidi, kio estas morala kaj kio estas ofenda, tiu alia registaro povus facile decidi, ke abortigoj aŭ geaj rajtoj estas kontraŭmoralaj kaj ofendaj per si mem, kaj ĉiuj opinioj, kiuj subtenas ilin, estus same konsiderataj “kontraŭmoralaj” kaj “eliminindaj” el la amaskomunikiloj (kaj multaj homoj ja opinias tiel!). Kien tio gvidos? Al totalismo...

Sed ĉu ĉio ĉi signifas, ke la esprimlibero devas esti absolute senlima? Ne. Por politikistoj kaj la registaroj, kaj tiom pli, gvidantoj de landoj – ne, ne kaj ankoraŭfoje ne. Ili ĉiam havas plej grandan respondecon ne nur pri ĉiu sia ago, sed ankaŭ pro ĉiu sia vorto. Kio pri amaskomunikiloj? En la demokratia mondo amaskomunikiloj ne devas esti aĉetitaj de politikistoj kaj la registaro. Ĵurnalistoj devas labori konvene al la principoj de ĵurnalismo kaj ĉiel strebi esti neŭtralaj kaj prezenti ambaŭ flankojn de afero; redaktoroj devas publikigi opiniojn kaj reagojn, ankaŭ la opiniojn de legantoj, kiuj ne nepre reprezentas la vidpunkton de la redakcio, kaj tiel favori diskuton kaj ne timi, ke iu denuncos ilin pro tio. La homoj rajtas kaj devas esti informitaj diversflanke por formi sian propran opinionon. Kiel skribis Andrew SULLIVAN en la revuo “Time”, “La libereco signifas lerni travivi ofendiĝon”.

Ĵenja AMIS, *KONTAKTO*-red.

Denaskismo – pli atentenda

Mi kun plezuro legis en *KONTAKTO* 206 la materialojn pri denaskismo. Tiu fenomeno bedaŭrinde kaj erare estas opiniata kiel afero nur por E-familioj, kaj publikaĵoj pri ĝi preskaŭ ne aperas en renomaj E-eldonadoj. Sed la denaskismo estas same interesa por ĉiuj kiel E-literaturo, E-historio kaj aliaj E-aferoj. Mi esperas ke *KONTAKTO* ankoraŭ plurfoje revenos al la temo, kunlaborante kun la Rondo Familia kaj apartaj denaskulaj gepatroj.

Dume mi kelkvortu pri mia sperto. Kun la unua infano (filo Sergej) mi parolis E-lingve ekde lia naskiĝo. La edzino ne scipovis Esperanton, kaj malgraŭ tio la filo flue parolis la lingvon kun mi kaj okazaj samideanoj. Do, iom eraras aŭtoro de la artikolo dirante: *“Se tamen patro kaj patrino interparolas nacilingve... la infanoj komprenas, ke ili rajtas alparoli ambaŭ gepatrojn nacilingve, kaj rezulte ili nur pasive regos Esperanton”* (vd. *KONTAKTO* 206, 2005:2, p. 6). Jes, mia fileto ekde kiam li ekparolis ruse al la edzino provis ankaŭ mian scipovon de la rusa, sed mi obstine “ne komprenis” lin kaj tre rapide li alkutimiĝis ke mia vizaĝo bezonas mian lingvon. Kelkaj miaj E-kursanoj, kiuj krom E-o uzis ankaŭ la rusan kun siaj infanoj, venigis la infanojn ĝis nur pasiva kompreno de la E-alparolo. Kaj en la aĝo de 17 jaroj, kiam ni decidis kun la filo fojfoje uzi la rusan, ni devis tion eĉ iom longe lerni... Sed mia filo ne iĝis esperantisto. Nu, pliajn detalojn de mia sperto oni vidu en *Literatura Foiro* 166, p. 93 (<http://anatolog.narod.ru>).

Kun mia tria infano (dua edziĝo), Sveta GONĈAROVA, mi parolis E-on (la panjo ruslingvis al ŝi) nur dum kvin jaroj, sed poste mi translokigis je kvar mil kilometroj kaj... ŝi fariĝis eĉ aktiva E-uzanto. La sekreto estas ke ne sufiĉas nur instrui la lingvon – necesas aligi la hometon de la infaneco al E-respubliko: la patrino de la filino ekde infaneco prenadis ŝin al diversaj E-aranĝoj, en- kaj eksterlandaj...

Anatolo GONĈAROV, Rusio (Siberio)

Proponu viajn temojn!

Kiel honora membro de TEJO, mi estas tiu, kiu legas *KONTAKTON* jam dekojn da jaroj. Mi estas kontenta konstati kaj iasence flati vin: sub la redaktado de Ĵenja kaj aliĝinta pli poste Joel la revuo fariĝis ege interesa, kaj tiun interesvekon ne laste provokas ofta aperigo de materialoj el la vivo de E-komunumo. Mi ĝojas, ke ankaŭ miaj du temproponoj, sufloritaj siatempe al Ĵenja, jam aperis surpaĝe de *KONTAKTO*. Mi alvokas ankaŭ aliajn legantojn de la revuo proponadi al la redakcio laŭ vi interesajn temojn, ja la revuo estu tia, kia ni ĉiuj ĝin deziras. Nun mi proponas (supozante tion interesa), kolekti ĉe la denaskulaj gepatroj interesajn lingve kaj sence diraĵojn de la E-denaskuloj, kaj kolekte aperigi en *KONTAKTO*. Ankaŭ mi kontribuos al la temo.

Anatolo GONĈAROV, Rusio (Siberio)

KONTAKTO – rete!

Bona novaĵo por *KONTAKTO*-abonantoj, membroj kaj patronoj de TEJO! Ekde nun ĉiuj freŝaj numeroj de *KONTAKTO* haveblas rete, per la reta Jarlibro de UEA: www.uea.org. Vizitu kaj legu *KONTAKTON* antaŭ atingos vin via papera ekzemplero!

JUNA AMIKO – internacia e-revuo de ILEI por lernejoj kaj komencantoj

– aĝas 30 jarojn kaj aperas 3-foje jare (aprilo, septembro, decembro) sur po 52 plurkoloraj paĝoj kun plenkoloraj kovriloj;
– havas kunlaborantojn el ĉiuj kvin kontinentoj;
– rabato ĝis 50%!
Karakterizas ĝin:
modela stilo kaj facila lingvaĵo (1500 vortradikoj sen glosoj), *enhavo tre varia*: rakontoj, fabeloj, raportoj, informoj, interesaĵoj, enigmoj, kvizoj, versaĵoj, ludoj, kantoj, humuro, lingvaj konsiloj, interkultura, kuriozaĵoj, voĉo de legantoj k.a. kun multaj ilustraĵoj.
JUNA AMIKO estas fonto de taŭgaj legaĵoj por komencantoj, fidinda helpilo por E-kursgvidantoj.
Vizitu nian TTT-ejon: <www.junaamiko.inf.hu> aŭ en <www.lernu.net>!

Kotiztabelo de UEA por 2006

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Aŭstralio/dolaro	15	38	95	57	34	190
Aŭstrio/eŭro	9	22	56	36	22	112
Belgio/eŭro	9	22	56	36	22	112
Brazilo/eŭro	4	11	28	17	10	56
Britio/pundo	6	15	38	24	14	76
Bulgario/eŭro	4	11	28	17	10	56
Ĉeĥio/krono	200	490	1220	770	460	2440
Danio/krono	65	165	415	265	160	830
Estonio/eŭro	5	12	30	19	11	60
Finnlando/eŭro	9	22	56	36	22	112
Francio/eŭro	9	22	56	36	22	112
Germanio/eŭro	9	22	56	36	22	112
Greklando/eŭro	9	22	56	36	22	112
Hispanio/eŭro	9	22	56	36	22	112
Hungario/forinto	1500	3700	9200	5800	3500	18400
Irlando/eŭro	9	22	56	36	22	112
Islando/eŭro	9	22	56	34	20	112
Israelo/eŭro	7	18	44	26	16	88
Italio/eŭro	9	22	56	36	22	112
Japanio/eno	1200	3000	7500	4500	2700	15000
Kanado/dolaro	14	34	86	52	31	172
Malto/eŭro	6	15	38	24	14	76
Nederlando/eŭro	9	22	56	36	22	112
Norvegio/krono	75	185	460	275	165	920
Nov-Zelando/dolaro	17	44	109	65	39	218
Pollando/zloto	20	50	120	75	45	240
Portugalia/eŭro	9	22	56	36	22	112
Rusio/eŭro	4	11	28	17	10	56
Slovakio/krono	200	550	1400	900	550	2800
Svedio/krono	80	210	520	330	200	1040
Svislando/franko	14	34	86	52	31	172
Usono/dolaro	10	25	63	38	23	126
TARIFO A/eŭro	6	15	38	23	14	76
TARIFO B/eŭro	4	11	28	17	10	56

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgio laŭ Belgio; San-Marino laŭ Italio; Kipro laŭ Malto; Liĥtenŝtejno laŭ Svislando; Latvio, Litovio kaj Slovenio laŭ Estonio.

TARIFO A: Honkongo, Korea Respubliko, Singapuro, Sud-Afriko, Tajvano.
TARIFO B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

MALLONGIGOJ:

MG – Membro kun Gvidlibro

MJ – Membro kun Jarlibro

MJ-T – MJ malpli ol 30-jara (individua membro de TEJO; ricevas ankaŭ la revuon *KONTAKTO* kaj la bultenon *TEJO tutmonde*)

MA – Membro-Abonanto (ricevas la Jarlibron kaj la revuon *Esperanto*)

MA-T – MA malpli ol 30-jara (individua membro de TEJO; ricevas ankaŭ la revuon *KONTAKTO* kaj la bultenon *TEJO tutmonde*)

SA – Simpla abono de revuo *Esperanto* sen membreco

Kto – Simpla abono de revuo *KONTAKTO*

SZ – Societo Zamenhof (subtena kotizo aldona al membreco)

PT – Patrono de TEJO: 3-oblo de MJ (ricevas *KONTAKTO* kaj *TEJO Tutmonde*)

DM – Dumviva Membro: 25-oblo de MA (ricevas dumvive la samon kiel MA)

DMJ – Dumviva Membro kun Jarlibro: 25-oble de MJ (ricevas dumvive la samon kiel MJ)

Kiel individuaj membroj de TEJO (MJ-T aŭ MA-T) por 2006 estos registritaj tiuj individuaj membroj de UEA, kiuj estos malpli ol 30-jaraj la 1an de januaro 2006 (t. e. kiuj naskiĝis en 1976 aŭ poste). Ankaŭ Dumvivaj Membroj samtempe membras en TEJO, dum ili estas malpli ol 30-jaraj.

Eblas aboni ankaŭ al *TEJO tutmonde* sen membreco en TEJO. La abonprezo estas duono de la MJ-kotizo por la koncerna lando.

Oni povas pagi pere de la perantoj de UEA, aŭ rekte al UEA per ĝiro al ĝia banka aŭ poŝta konto, per ĉeko aŭ poŝtmandato, aŭ per kreditkarto.

FARIĜU KONSCIA SUBTENANTO DE TEJO!

fariĝu patrono de TEJO

Pagante trioblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas la esperantistan junularon; de TEJO vi ankaŭ ricevas:

– revuon *KONTAKTO*

– bultenon *TEJO Tutmonde* (oficiala organo de TEJO)

– akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso

– aliajn laŭokazajn servojn kaj publikigaĵojn

